



IL POPOLO CINIO

中國報道

8
1986





Sunsubiro en Gansu-provinco

Foto de **FANG FANG**

Enhavo

Cefaj taskoj de la Sepa Kvinjara Plano de Ĉinio	2
MALFERMITAJ URBOJ: Jingkoŭ — la dua granda pordo de nordorienta Ĉinio	20
Por la 35-jara jubileo de ĈEL (Bildoserio)	5
Nova ŝanco por terminologio	10
SUR NIA LIBROBRETO: Ni devas vivi bone	8
POR KOMENCANTOJ: Dejortabelo	24
ESP-NOVAĴOJ	25
Rezervejo por makakoj	26
Instruisto Mi	41
Ŝekspiro inter la ĉinoj	13
MIKRONOVELO: Hazarda ripetigo sub purpura acero	39
POR VIA SANO: Ok sanigaj ekzercoj (IV)	29
TIBETO HIERAŬ KAJ HODIAŬ (19): Vivo de ordinaruloj	46
Fragmentoj el amleteroj	61
Prifosado de Dadu, la ĉefurbo de Ĵuan-dinastio	36
VOJAĜO TRA ĈINIO: Ĉengde, "ĉefurbo" norde de la Granda Muro	30
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: La teritorio kaj loĝantaro de Ĉinio	56
Homoj, riĉfontoj kaj medio	58
EL REALA VIVO DE ĈINIO: Vivo de fiŝistoj	52
AMUZO	68
INTER NI: Opinioj alte taksindaj	65
KURANTAJ AFEROJ	43
ĈINLINGVA KURSO	67

SUR LA KOVRILO: Sceno el la pekina opero "Otelo"

Foto de LI ĈUNGENG

INTERNE DE LA KOVRILO: Sunsubiro en Gansu-provinco

Foto de FANG FANG

INTERNE DE LA DORSKOVRILO: Ora ĉiela globuso

de JUAN HONGĈJI

SUR LA DORSKOVRILO: La Templo de Granda Budho en Ĉengde

de HAŬ HŬA

JARABONTARIFO		Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00	
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalio	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 8.00 US\$ 10.00 Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50											

Ĉefaj Taskoj de la Sepa Kvinjara Plano de Ĉinio



Ĉefministro Gaō Ziyang faras raporton pri la Sepa Kvinjara Plano en la Kvara Sesio de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso.

Kiam Ĉinio eniris en la decidan periodon, en kiu ĝiaj ekonomiaj strategio kaj strukturo transiras de malnova modelo al la nova, en aprilo ĉijare la Kvara Sesio de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso sankciis la Sepan Kvinjaran Planon (1986—1990) pri la Nacia Ekonomio kaj Socia Disvolviĝo proponitan de la ĉina registaro. La plano celas akceli la sisteman reformon, pluapaŝe pliigi la ekonomiajn fortojn kaj plibonigi la polan vivon.

En la 36-jara historio de post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko estis plenumitaj ses kvinjaraj planoj ekskluzive de la tri jaroj tuj post la fondiĝo de la nova respubliko kaj la tri jaroj 1963—1965. Inter ili la Unua Kvinjara Plano—(1953—1957) kaj la Sesa Kvinjara Plano (1981—1985) estis la plej sukcesaj. La Unua Kvinjara Plano akiris grandajn atingojn. Kaj la Sesa-Kvinjara Plano rikoltis ankoraŭ pli elstarajn atingojn kaj ŝanĝiĝojn. En tiu periodo Ĉinio efektivigis signifoplenajn historiajn strategiajn ŝanĝojn. Mi eksplikas ĉi sube:

Nia strategio pri ekonomia kaj socia disvolviĝo turnis sian graviton de unuflankeca akcento

de pliigo de produktokvanto kaj produktovaloro de industrio, precipe de la peza industrio, al la harmonia disvolvo de agrikulturo, malpeza industrio kaj peza industrio, al kuna disvolviĝo de ekonomio, sciencoj, tekniko, eduko, kulturo kaj socio, kun altigo de ekonomia efiko kiel la centro.

La rigida ekonomia strukturo karakterizita per tro multa kaj tro rigida administrado transiras al nova vigla strukturo konvena al la laŭplana disvolviĝo de var-produkta ekonomio surbaze de publika posedsistemo. La reformo de la ekonomia strukturo sukcesis unue en la kamparo, kaj la kampara ekonomio komencis disvolviĝi al specialigo, var-produktado kaj modernigo. En la urboj la reformo estas centrita sur vigligo de entreprenoj, kaj efektivigata malsamgrade ankaŭ en la planada, financa, imposta, preza, mona, komerca kaj laborsalajra kampoj. Rezulte de tio, la urba ekonomio senprecedence prosperas.

Koncerne la ekonomiajn rilatojn kun aliaj landoj la ferma kaj duonferma ekonomio cedis lokon al malferma ekonomio karakterizita per pozitiva uzado de internacia interŝanĝo. Ni rom-



pis la katenojn de "maldekstra" ideologio kaj aŭtarcia ekonomio kaj korektis la eraron kontraŭstarigi la principon "sin apogi sur la propraj fortoj" al la pordomalferma politiko. Tio ebligis al ni akiri elstarajn sukcesojn en utiligo de en-kaj eksterlandaj rimedoj, en privastigo de en-kaj eksterlanda merkatoj kaj en organizado de la enlanda konstruado kaj disvolvado de ekonomiaj rilatoj kun aliaj landoj.

La supre diritaj ŝanĝiĝoj montris, ke Ĉinio jam trovis ĝustan vojon de socialisma konstruado kun ĉinaj trajtoj, kaj samtempe metis firman bazon kaj kreis bonajn kondiĉojn por la nacia ekonomio kaj socia disvolviĝo en la periodo de la Sepa Kvinjara Plano kaj eĉ en la pli postaj jaroj.

La bazaj taskoj difinitaj de la Sepa Kvinjara Plano estas jene: Unue, krei favorajn ekonomian kaj socian mediojn por reformo de la ekonomia strukturo tenante fundamentan ekvilibron inter la totalaj sociaj postuloj kaj provizoj por faciligi la reformon, por fundamente meti bazon por nov-tipa socialisma ekonomia strukturo kun ĉinaj trajtoj en la venontaj kvin aŭ pliaj jaroj. Due, daŭrigi la stabilan kreskon de la ekonomio, akceli la konstruadon de ŝlosilaj projektoj, teknikan reformon kaj la disvolvon de intelekta ekspluato sub la premisoj de regado de la investado de fiksitaj kapitaloj por prepari materialojn, teknikon kaj edukitajn personojn bezonatajn por daŭra

ekonomia kaj socia disvolviĝo en la 90-aj jaroj. Trie, plibonigi la vivnivelon de la urbanoj kaj kamparanoj sur la bazo de disvolvo de produktado kaj plialtigo de ekonomia efiko.

Tiuj taskoj estas strikte interligitaj. Laŭ la postuloj de tiuj taskoj, la Sepa Kvinjara Plano difinis, ke en la kvin jaroj de 1985 ĝis 1990 la totala industria kaj agrikultura produktovalorado de nia lando kreskos je 38% (en 1990 ĝi atingos 1 677 miliardojn da jŭanoj), t.e. kreskos meznombre je 6.7% ĉiujare; la totala nacia produktovalorado kreskos je 44% (en 1990 ĝi atingos 1 117 miliardojn da jŭanoj), nome kreskos meznombre je 7.5% ĉiujare; la produkta kvoto de nacia enspezo pliiĝos je 38% (en 1990 ĝi atingos 935 miliardojn da jŭanoj) kaj kreskos meznombre je 6.7% ĉiujare. En 1990 ĉiu landano konsumos meze 517 jŭanojn, kaj la jara kresko estos 5%. La procentoj de la ekonomia kresko difinita en la Sepa Kvinjara Plano estas pozitiva, tamen ne tro alta, kaj oni eble povos superi ĝin en la praktikado.

Por meti la ĉinan ekonomion sur la bazon de scienca kaj teknika progreso, la Sepa Kvinjara Plano alte taksas la disvolvon de sciencoj, tekniko kaj edukado. La plano difinis, ke en la venontaj kvin jaroj la ŝtato solvos 76 ŝlosilajn sciencajn projektojn, plenumos 200 projektojn de teknika ekspluato kaj disvastigo kaj apliko de gravaj

La prezidantaro de la Kvara Sesio de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso aprobas la Sepan Kvinjaran Planon kaj la rezolucion pri ĝi.



sciencaj kaj teknikaj fruktoj, por atingi impetan disvolviĝon en solvo de kelkaj novaj teknikaj problemoj kun ŝlosila signifo kaj elstarajn sukcesojn en reformado de tradiciaj industrioj per nova tekniko. La plano ankaŭ difinis, ke iom post iom efektiviĝos naŭ-jara deviga edukado. En la venontaj kvin jaroj la totala elspezo por edukado atingos 116.6 miliardojn da jŭanoj, je 72% pli multe ol tiu en la periodo de la Sesa Kvinjara Plano, kio superos la kreskan rapidon de la regulaj ŝtataj enspezoj.

Dum la periodo de la Sepa Kvinjara Plano Ĉinio per pli da fortoj pligrandigos la skalon de la ekstera komerco, utiligo de eksterlandaj kapitaloj kaj enkonduko de avangarda tekniko. En 1990 la totala sumo de importado kaj eksportado estos 83 miliardoj da usonaj dolaroj, je 40% pli multe ol tiu en 1985.

Por plene efektivigi la konstruajn taskojn difinitajn de la Sepa Kvinjara Plano, ni devas profunde kaj sisteme reformi la ekonomian strukturon kun ĉefaj enhavoj jenaj: Plue vigligi entreprenojn, precipe la grandajn kaj mezgrandajn ŝtatajn entreprenojn, turni ilin en relative sendependajn ekonomiajn entojn, en socialismajn varproduktantojn kaj vendantojn havantajn plenan

aŭtoritaton en administrado kaj plenan respondecon pri siaj propraj profitoj kaj perdoj. Plenforte akceli horizontalajn ekonomiajn kunligojn inter la entreprenoj, kaj tiele iom post iom establiĝos asocioj de entreprenoj de malsamaj formoj kaj niveloj. Pluapase disvolvi socialisman komercaĵan merkaton, daŭre redukti la specojn kaj kvantojn de produktaĵoj sub unueca asignado kaj distribuado de la ŝtato. Aktive disvolvi inter-regionan kaj inter-departementan var-cirkuladon, iom post iom establi novajn komercajn formojn, kiuj kombinas agrikulturon, industrion kaj komercon, aŭ agrikulturon kaj komercon, aŭ industrion kaj komercon, aŭ komercon en malsamaj regionoj, kaj konstante ekspansiigi la merkatojn por konsumaj varoj kaj produktorimedoj. La ŝtato establos novan socialisman makroekonomian administran sistemon, turnante ĉefe rektan regadon en la ĉefe nerektan en sia administrado de entreprenoj.

Ĉiuflanka reformo al ekonomia strukturo estas tre malfacila kaj kompleksa tasko, kiu certe ne povos esti plene plenumita en la periodo de la Sepa Kvinjara Plano. Ni tamen kredas, ke ni povos konstrui skeleton de la nova ekonomia strukturo en tiuj kvin jaroj, kaj puŝi nian ekonomion sur la relojn de nova strukturo.

Popolaj reprezentantoj diskutas pri la Sepa Kvinjara Plano.



Por la 35-jara jubileo de ĈEL

de SJAŬ HŬOLI

La 16-an de marto 1986 pli ol 250 ĉinaj esperantistoj kunvenis en la Nacieca Kultura Domo en Pekino por festi la 35-jaran jubileon de la Ĉina Esperanto-Ligo.

La kunvenon prezidis s-ro Ĉu Tunan, prezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto". Ĉe la komenco la partoprenantoj staris en unu-minuta silento por rememori s-anon Hujucz, pioniron de la ĉina Esperanto-movado kaj prezidanton de ĈEL.

La ĝenerala sekretario de ĈEL s-ro Ĝang Ĉjiĉeng faris raporton

pri la laboro de la ligo dum la pasintaj jaroj kaj la preparo por la 71-a UK.

Donis parolon ankaŭ vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj prezidanto de la Honora Komitato de la 71-a UK s-ro Hŭang Hŭa, vicurbestro de Pekino s-ro Ĉen Haŭsu kaj asistanto de la kultura ministro s-ro Liŭ Dejoŭ. Hŭang Hŭa diris, ke Esperanto estas granda idealo, granda esploro kaj granda praktiko. Estas grava evento okazigi en Pekino la 71-an UK. Li esperis, ke la kon-

greso iros vigle kaj alportos ĝojon al ĉiuj partoprenantoj, kaj ke la eksterlandaj amikoj kunportos al sia patrolando la amikecon de la ĉina popolo. Ĉen Haŭsu kaj Liŭ Dejoŭ emfazis la atenton de la pekina magistrato kaj la kultura Ministerio al la 71-a UK kaj promesis, ke ili kreos favorajn kondiĉojn por la kongreso.

La kunvenon ĉeestis ankaŭ la aganta prezidanto de la ligo Ĵelezo, ĝia vicprezidanto Ĉen Ĵuan kaj eminentuloj Ge Baŭĉjŭan, Chun-Chan Yeh kaj aliaj.

Hŭang Hŭa (maldekstre), Ĉu Tunan (meze) kaj Ĉen Haŭsu (dekstre) en la kunveno






La kunveno


Liŭ Dejoŭ (dekstre) kaj Chun-Chan Yeh





Gang Cjiĉeng faras raporton.

Junaj kaj veteranaj esperantistoj en la kunveno





Jelezo (maldekstre) kaj Cen Jūan

SUR NIA LIBROBRETO

Ni devas vivi bone

En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitaĵojn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekompencas pro la kontribuadoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

La Red.

BUKEDO AL VI kolekto de mikronoveloj eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Formato: 11 × 18 cm. 96 p. Prezo: US\$ 1.30. Mendebila ĉe la perantoj de EPC kaj la Internacia Librokomerca Kompanio de Ĉinio.

Ĉina Esperanto-Eldonejo aperigis antaŭ nelonge 24 mikronovelojn de diversaj nuntempaj aŭtoroj de Ĉinio sub la komuna titolo "Bukedo al Vi".

La titolo mikronovelo prezentas elstaran gimnastikon, kiu foje mal-

sukcesinte en internacia konkurso revenas hejmen kun honto. Ĉi-foje mankas la kutimaj florbukedoj, ĵurnalistoj ne rimarkas ŝin. Ĉe la profundiĝanta deprimito subite bonvenigas ŝin stevardino, kiu venis danki ŝin pro ŝia penado kaj esprimi la kredon pri ŝi kiel homo. Ĝuste tiaj homaj sentoj speguliĝas en la tuta novelekolekto, kiun konsistigas gamo da eroj el la ĉiutaga vivo de nuntempaj, ordinaraj ĉinoj.

Per la noveletoj ni povas sekvi familian vivon, interhoman amikecon, naskiĝantan amon, scenojn el la vivo de ĉina junularo. En kelkaj noveletoj oni montras la helpopretecon kaj solidarecon de najbaroj, kio tute speciale reliefigas en la mikronovelo "Amo en Nova Senco" kaj en tiu pri la juna knabo Pangpang, kiu revenas de la lernejo hejmen, sed, perdinte la ŝlosilojn, li ne povas eniri sian loĝejon. Feliĉe prizorgas lin eĉ kelkaj najbaroj samtempe. Pensiga, ĉar ja bedaŭrinde tutmonde konate, estas la malĝusta, humiliga sin-

teno de filo al patrino en la noveleto "Manko".

Karakteriza estas la strebado de ĉinoj al plialtigo de siaj kulturnivelo kaj instruiteco, kion i.a. prezentas la noveleto "Li Volis Kanti". La heroo de la noveleto (aĉetinta televidilon kaj deziranta studi en korespondanta universitato) demandas: "Ĉu la kamparanoj devas resti senkulturaj de generacio al generacio?" Kaj li tute klare respondas, ke li ne volas, ke liaj filoj kaj nepoj estu senkleraj.

La vasta prezento de homaj sintenoj kaj kondutoj, la koncizeco de mikronovelo kiel literaturformo, la varieco de la temoj — ĉio ĉi kaŭzas, ke la mikronoveloj "Bukedo al Vi" ege taŭgas por daŭrigaj kursoj kaj memlernantoj, des pli, ke la lingvaĵo estas relative simpla kaj ĝenerale bonnivela, samkiel en ĉiuj ĉinaj E-eldonaĵoj. Ĝi ankaŭ estas rekomendinda al tiuj esperantistoj, kiuj volas iom pli proksime ekkoni la nuntempan Ĉinion. "Ni devas vivi bone. . ." diras la



hero de la noveleto "Aŭtuna Rememoro". Kaj ĉi tiu ideo iel ŝpiniĝas tra la tuta libro montrante, kiel ĉinoj strebas al pli bona vivo. Ni esperu, ke en la bukedo da ĉinaj mikronoveloj abundas ankaŭ aliaj floroj, kiujn indus aperigi en E-vesto.

Recenzis A. Pettyn (Pollando)

NOVE RICEVITAJ LIBROJ

LA FAMILIO DE PASCUAL DUARTE de Camilo José Cela, tradukita de Fernando de Diego, eldonita de la Barcelona Esperanto-Centro. Formato: 11 × 18 cm. 167 p. Prezo nemontrita.

KANTOJ KARMEMORAJ kolekto de 33 japanaj kantoj kaj 20 alilandaj kantoj, kompilita de Konisi Gaku kaj eldonita de la Japana Esperanta Librokooperativo. Formato: 18 × 27 cm. 62 p. Prezo: 13 gld. Mendebila ĉe la eldonejo (adr.: Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka, Oosaka-hu, Japanio).

MAKS KAJ MORITS bildrakonto en versoj de Wilhelm Busch, esperantigita de Rudolf Fischer, eldonita de Deutscher Esperanto-Bund e. v. Formato: 15.3 × 18.8 cm. 80 p. Prezo nemontrita.

GERMANA ANTOLOGIO redaktita de Ortwin Brodt, esperantigita

de Wilhelm Herrmann kaj Helmut Rössler. Formato: 12 × 19 cm. 328 p. Prezo nemontrita.

ANTOLOGIO DE PORTUGALAJ RAKONTOJ kompilita de Manuel de Seabra, eldonita de Grupo de Admirantoj de Zamenhof. Formato: 12 × 19 cm. 224 p. Prezo nemontrita.

NOVELOJ de Henryk Seinkiewicz, esperantigitaj de Lidia Zamenhof, ofsete represita laŭ la eldono de 1925 en Leipzig, kun antaŭparolo nove aldonita de Adrzej Pettyn. Formato: 12.3 × 18 cm. 66 p. Prezo nemontrita.

KANTOJ DE L' SILENTO poemaro de Zora Heide en la kroata kun tradukaĵo Esperanta de Lucija Borčić, Ivo Borovečki kaj Emilija Lapenna. Formato: 14.3 × 21 cm. 136 p. Prezo nemontrita.

SPUROJ DE L' DOLORO originala poemaro de Zora Heide, eldonita de Författares Bokmaskin. Formato: 14.3 × 21 cm. 103 p. Prezo nemontrita.

MATEMATIKA TERMINARO ESPERANTO-ANGLA-FRANCA-SVEDA kompilita de prof. Christer O. Kiselman, eldonita de la Matematika Instituto de Uppsala

Universitato. Formato: 21 × 29.5 cm. Prezo nemontrita.

IOM PRI LA MENSA SINPREPARO verkita de Jindřich Novak kaj Ivan Špička. Formato: 14.5 × 20.2 cm. 33 p. Prezo nemontrita.

KRONO DE L' SONETOJ de France Freseren, tradukita de Tone Logar, eldonita de la Societo de St. Hermagoro. Formato: 8 × 14 cm. 40 p. Prezo nemontrita.

SOCIALISMA MEMMASTRADO de Edvard Kardelj, esperantigita de Rosaria Tradukrondo de Argentinejo, eldonita de SAT-broŝurservo. Formato: 13 × 20 cm. 260 p. Prezo: 20 gld.

LA NOVA PARADIGMO EN PSIKOLOGIO de R. F. Gonzalez, esperantigita de Rosaria Tradukrondo de Argentinejo, eldonita de SAT-broŝurservo. Formato: 13.7 × 20.7 cm. 260 p. Prezo nemontrita.

JIVOI, OTDADEN NA SVOJA HAROD en la bulgara lingvo kun antaŭparolo kaj resumoj en Esperanto, kolekto de materialoj de la 120-jara jubileo de la publicisto, kuracisto kaj pioniro de Esperanto Ĥristo Popov. Redaktita de prof. Nikola Nikolov. Formato: 15.5 × 21.7 cm. 178 p. Prezo nemontrita.

INTERNACIA ASOCIO DE HANDIKAPITAJ ESPERANTISTOJ (IAHE)

eldonas specialigitan revuon:

VOĈO DE HANDIKAPULOJ

La celo de tiu ĉi revuo estas aŭdigi voĉon kun fizikaj malavantaĝoj, ne por plendi, sed por esprimi kreivecon, optimismon, amon kaj homan fratecon kaj humanecon.

Redaktas: S-ro Dušan Adnadj

Jarabono: 5.-US dol. aŭ egalvaloro en nacia valuto, pagbla al nia konto ĉe UEA sub kodo: Voch-o aŭ per internacia poŝtmandato al nia adreso: "Voĉo de Handikapuloj" 56227-Borovo, Školska ul. 25, Jugoslavio.

Nova ŝanco por terminologio

1. Faka apliko kaj terminara kaoso

Por ĉiuj esperantistoj, precipe la novaj, gravas la demando: por kio mi lernas la lingvon, kiel mi utiligu mian scion? Ĉu ĝi servas ne nur al kongresa habilado kaj koresponda spertintersanĝo pri vetero kaj personaj vivkondiĉoj — aŭ alivorte: Ĉu Esperanto taŭgas por profunde trakti specialajn temojn el mia profesia aŭ ŝatokupa sfero? La respondo konatas: principe jes. . . !

Principe jes, se ekzistus terminaro pri la koncerna fako, se mi trovus en koncerna vortaro la terminojn, sen kiuj interkomunikado pri iu speciala tereno ne eblas.

Ĉar tiu manko evidentiĝis jam tre frue en la movada historio, esperantistoj-fakuloj jam antaŭ la mondmilito komencis kompili fakvortarojn. Ili serĉis en la literaturo jam ekzistantajn esprimojn kaj kreis novajn vortojn, kie ili mankis.

Sed okazis, ke kolego el la sama fako, eble eĉ el la sama lando, ne sciante pri tia verko — aŭ ĉar ĝi ne kontentigis lian bezonon — kompilis kaj eldonis alian vortaron. Precipe en la lastaj jaroj tiel estiĝis multaj duoblaĵoj kaj sinonimoj, malhelpaj por faka komunikado kaj kompromitaj por Esperanto en ekstermovadaj rondoj. (Plej konataj ekzemploj: la batalo inter komputilo — komputoro — komputero k. a., resp. dato — datumo — dateno, donitaĵo)

2. Unuaj provoj pri kunordigado

Vidante la danĝeron, kiu tiamaniere minacas precipe internacian planlingvon, en la 50aj jaroj ISAE kaj la Akademio de Esperanto starigis Terminologian Centron, kiu sub gvido de R. Hafer-

korn (FRG) klopodis unuecigi la terminarajn laborojn por Esperanto. En 1970 R. Eichholz (Kanado) transprenis tiun taskon. Tradukante la germanan "Bilder-Duden" (FRG) al "Esperanta Bildvortaro" li kunlaborigis ĉ. 200 diverslandajn fakulojn. El la slipoj, per kiuj ili interŝanĝis siajn opiniojn, estiĝis, kvazaŭ krom-produkto, la "Slipara Vortaro".

Nun, en la 80aj jaroj, ekestis nova iniciato por kunordigi la pliiĝantajn, sed disajn kaj parte paralelajn klopodojn.

En la kadro de la Scienc-Eldona Centro de UEA (SEC) en Budapeŝto kelkaj volontuloj starigis Terminologian Sekcion (TeS), kiu nun, post la — espereble provizora! — likvido de la Budapeŝta oficejo de SEC, rekte ligiĝas al UEA. La sekretario de TeS, Ivan Bujdoso, Budapeŝto, kolektas adresojn de interesitaj fakuloj por interkonatiĝi ilin kaj instigi al kunlaboro en internaciaj, fake specialigitaj terminografiaj komisionoj. Kiel unuaj formiĝas la komisionoj pri aeronautiko, bibliotekscienco, (bio-)kemio, informadiko (komputiko), lumigado k. a.).

3. Ekstermovada, internacia normiga movado

Kvankam esence grava por Esperanto, la problemo de internacia komunikado tamen ne nur koncernas nian Movadon.

En ISO (International Organization for Standardization), kiu de la 20aj jaroj okupiĝas pri objekt-normigo, oni sufiĉe frue eksciis, ke normigo de materialoj, substancoj kaj maŝinoj ne eblas sen interkompreniĝo pri la koncernaj normoj. Tiel eldoniĝis, apud normoj pri grandoj, mezuroj kaj teknikaj detaloj de industriaj pro-

duktoj, ankaŭ normoj pri terminoj de diversaj fakoj.

Por ke tiuj terminaroj estiĝu laŭ unuecaj principoj, en 1936 eĉ fondiĝis speciala teknika komitato "TC 37" por ellabori gvidliniojn kaj terminologiajn principojn.

Krom ISO, en kiu nun 74 naciaj norm-komitatoj kunlabore prizorgas preskaŭ ĉiujn (teknikajn) terenojn, specialaj organizaĵoj okupiĝas pri normigo en specialaj fakoj (IEC=International Electrotechnical Commission, IUPAC=International Union of Pure and Applied Chemistry kaj aliaj).

En ŝtatoj, kie regas du- aŭ plurlingveco, la konscio pri fakaj tradukproblemoj "laŭnature" estas pli evoluinta: en USSR kaj Kanado Akademio de Sciencoj respektive universitato okupiĝas pri terminologi-normigaj demandoj.

Grandaj industriaj entreprenoj, kiel Siemens kaj Philips, evoluigas proprajn terminologiajn datum-bankojn.

Informojn kaj dokumentojn pri ĉiuj terminologiaj aktivecoj kolektas Infoterm (International Information Centre for Terminology), la internacia informcentro por terminologio, kiun Unesco kaj la Aŭstria Norm-Instituto (ON) en Vieno fondis en 1971. Ĝia ĉefa tasko, apud dokumentado kaj informado, estas kunordigado de ĉiuj priterminologiaj klopodoj sur nia globo.

4. La pioniroj estis esperantistoj-esperantologoj

Ĉu estas hazardo, ke gvidan rolon en la evoluo de tiu ĉi internacia terminologi-normiga "movado" ludis homoj, kiuj ne nur brile regis Esperanton, sed ankaŭ profunde estis studintaj ĝian strukturon kaj porterminologian taŭgecon? La plej elstaraj estis Eugen WÜSTER kaj Ernest DREZEN.

WÜSTER lernis Esperanton, tradukis plurajn beletrajn verkojn kaj kompilis 8-voluman Esperanto-germanan "Enciklopedian Vortaron" antaŭ ol li verkis doktorigan disertacion pri "Lingvonormigo en la tekniko". Tiu germanlingva libro, aperinta en 1931, fariĝis la bazo por la plua evoluo de nova scienco, la "Ĝenerala Terminologio-Teorio" (Allgemeine Terminologie-Lehre; General Theory of Terminology — GTT). Tiu libro jam entenas la bazajn ideojn por la postaj pri-terminologiaj rekomendoj de ISO (TC 37), dum kies ellaborado en internaciaj kolektivoj

Wüster estis la gvida kapo. Li ankaŭ instigis kaj energie akcelis la establon de Infoterm, kies honorofica direktoro li estis ĝis sia morto en 1977.

Sed ankaŭ Ernest Karloviĉ DREZEN, Ĝenerala Sekretario de Sovet-Respublikara Esperantista Unio (SEU), fondinto de la sovetia interlingvistiko kaj aŭtoro de multaj artikoloj kaj monografioj pri la teorio de internacia lingva komunikado kaj la historio de planlingvoj, estis samtempe rekonata specialisto pri terminologiaj demandoj. Laŭ komisiono de la Sovetia Akademio de Sciencoj li kuntradukis en la rusan la ĉefverkon de WÜSTER kaj skribis raporton, sur kies bazo en 1936 ISO fondis sian pri-terminologian teknikan komitaton TC 37. De li ankaŭ originas la ideo pri internacia terminologia kodo. Tiun ideon WÜSTER dum plurjardeka okupiĝo evoluis al tre ampleksa materialo, kiu nun, en la okdekaj jaroj, denove estas en aktuala diskuto.

5. Ŝanco por nova kvalito

La supre skizitaj faktoj en la Esperantomovado restis vaste nekonataj. Esperanto ĝis nun evoluis precipe dank' al la beletro kaj ne utiligis siajn skemismajn avantaĝojn por modele sistemigita fakleksiko; esperantistoj ne povis utiligi la ŝancon, enviciĝi en la internaciajn strebojn ĉi-rilate helpe de tiaj "pontaj" eminentuloj kiel WÜSTER, DREZEN k. a. — la ekonomiaj kondiĉoj kaj la konscio pri la graveco de scienca-faka komunikado ne estis sufiĉe evoluintaj.

Sed lastatempe ie kaj tie kreskas la kompreno, ke tiel ni ne povos daŭrigi sen riski la ŝancon iam ludi seriozan rolon en ekstermovadaj sciencaj rondoj.

Necesas esenca reorganizado de la faka laboro, necesas verkado/tradukado (kaj eldonado!) de altkvalitaj enkondukaĵoj en bazajn sciencojn — kaj necesas serioza okupiĝo pri la subevoluinta faka leksiko sur la nivelo de aktuala internacia terminologio(-scienco). Unua paŝo en la ĝustan direkton estas rezolucio, kiun akceptis la Komitato de UEA dum la 70a UK en Augsburg.

Jen la teksto:

I Konsiderante

— ke la scienc-teknika revolucio stimulas impete la evoluon de la faka lingvo,

— ke por la estonta pozicio de Esperanto en la mondo de fundamenta graveco estas ĝia altkvalita apliko en scienco kaj tekniko,

— ke tiu faklingva apliko de Esperanto en la postulenda kvalito nur eblas, se la terminologio respondas al la necesa nivelo kaj ke diletanteco kaj hazardeco de terminologia laboro grave endanĝerigas tiun kvaliton,

II Proponas al la Komitato, ke oni en la jaro 1987 fondu esperantan termin-normigan instituton kun la ĉefaj celoj

a) plibonigi kaj unuecigi la terminologian laboron,

b) reprezenti Esperanton en internaciaj normigaj institucioj (ISO, Infoterm k. s.)

III Proponas al la Komitato, ke ĝi

komisiu la Terminologian Sekcion de UEA (ĝis nun ligitan al la Scienc-Eldona Centro de UEA en Budapeŝto) kunlabore kun kompetentaj esperantistaj institucioj (Akademio de Esperanto, ISAE, CED, fakaj asocioj k. s.) trovi la kompetentajn homojn, prepari la necesajn dokumentojn kaj entrepreni aliajn necesajn paŝojn por ebligi la fondon de tiu Esperanta termin-normiga instituto

IV Proponas establi la "Fondaĵon Wüster" (fondaĵo terminologio) por certigi la necesajn financajn rimedojn por terminologiaj aktivecoj.

6. Ĉiuj povas kontribui

Surbaze de tiu rezolucio eblas la konstruado de pli solida, pli efika institucio ol povis ĝis nun rezulti el la klopodoj de bonvolaj unuopuloj. Sed la sukceso dependos de la preteco de ĉiuj kapablaj esperantistoj, doni sian specifan kontribuon por afero, kiu koncernas nin ĉiujn. Jen kelkaj ekzemploj, kiel eblas subteni la terminologi-normigan laboron:

6.1. organize-informe:

internacia (mondvasta) kunlaboro bezonas homojn, kiuj kapablas ĝin amplekse organizi. Ili devas akiradi kaj pludonadi ĝisdatajn sciojn pri terminologiaj teorio kaj praktiko (lernado kaj instruado), peri kontaktojn inter movadaj kaj ekstermovadaj instancoj, instigi esperantistojn-fakulojn al terminografia laboro kaj helpi/konsili al ili en organizaj demandoj;

6.2. terminografie:

la plej granda grupo da kunlaborantoj estos la fakuloj, kiuj konkrete prilaboros la terminarojn de siaj fakoj. Ili bezonas kaj superrigardan, kaj profundan scion pri sia fakoj, ĝeneralan kleron kaj bonan konon de lingvoj (ne nur la gepa-

tra kaj Esperanto, sed laŭeble ankaŭ aliaj); cetere tiu ĉi tasko postulas precizecon, paciencon kaj kunlaboremon;

6.3. finance:

ĉar terminologia agado estas science fundamenta kaj la eldonado de (norm-)fakvortaroj — pro la relative malgranda uzantaro — ne povas esti enspeza, finance memstara entrepreno, la esperantistaro devos zorgi por la necesaj rimedoj. Kvankam la laboro de terminografoj (vd. 6.2.) kaj de organizantoj (6.1.) ne estos pagata, tamen ne eviteblas diversaj elspezoj. Mondonacoj de ĉiuj altecoj do estos bonvenaj.

6.4. aplike:

ne laste necesas, ke la estontaj normoj estos konataj, disvastigataj kaj aplikataj. Neniu ŝtata aŭ jura potenco povas devigi la homojn, ke ili uzu tiun ĉi esperantan terminon kaj ne alian. Pro tio gravas tut-movada komprenemo, por ke fakuloj, (speciale aŭtoroj kaj redaktistoj) utiligu la terminarojn kaj apliku la normigitajn terminojn.


Jen nur kelkaj el la eblecoj por partopreni en la komuna plenumado de grava tasko. Se inter la menciitaj punktoj estas io por vi aŭ se vi havas aliajn ideojn por perfektigi la supran skizon — skribu al: Ivan Bujdosoj, sekretario de TeS,

TeS de UEA

H-1368 Budapeŝto, Pf. 193

aŭ al mi: Wera Dehler (estrarano de TeS)
GDR-1141 Berlino, Otto-Nagel-Str.
110, Pf. 113-05

PS: Por faciligi nian laboron, bv. laŭeble aldoni kopion de via letero!



Ŝekspiro inter la ĉinoj

Ŝekspiro estis majstro en la literatura historio de la homaro. La ĉinoj pasigis ĝojan feston en la 422-a naskiĝtago de Ŝekspiro — la Unuan Ĉinan Festivalon de Ŝekspiraj Dramoj.

La festivalo daŭris duonmonaton. Ĝi okazis aprile ĉi-jare en Ŝanhajo kaj Pekino. Multe da famaj fakuloj kaj eminentaj dramistoj partoprenis la festivalon. En la du urboj oni ludis sume 26 dramojn de Ŝekspiro kaj okazigis dekojn da simpozioj.

La festivalo ekscitis vivan intereson ĉe la popolo. En Ŝanhajo la teatraj biletoj havis grandan debiton. Preskaŭ ĉiuj loĝantoj deziris satigi siajn okulojn per la spektakloj kaj multaj eĉ

atendis plurajn horojn ĉe teatraj ĝiĉetoj por havigi al si biletan.

La ĉinoj ekkonis Ŝekspiron en 1903, kiam en Ŝanhajo oni tradukis kaj eldonis "Rakontojn de Ŝekspiro", verkitajn de la angla prozisto Charles Lamb kaj lia fratino Mary Lamb.

Post la Movado de la 4-a de Majo en 1919, dramoj de Ŝekspiro estis diskonigitaj en Ĉinio en teatraĵa formo kaj en populara ĉina lingvo. En 1921 la fama ĉina dramisto Tjan Han publikigis la dramon "Hamleto" en la revuo "Ĉinio en Infaneco", la majstroverkon de Ŝekspiro unuafoje aperintan en formo de dramo sur la ĉina literatura rondo.


En la komenca periodo de la 30-aj jaroj sur la scenejoj de Ĉinio aperis ĉ. 20 Ŝekspiraj dramoj nur kun ĉefaj intrigoj.

En la 30-aj jaroj sur la ĉinaj scenejoj vidiĝis pli kaj pli da Ŝekspiraj dramoj kun ĉiam pli alta prezenta nivelo. En 1930 la Ŝanhaja Drama Societo prezentis la Ŝekspiran dramon "La Komercisto de Venecio", kiu estis premiero en formo de moderna dramo sur la ĉinaj scenejoj.

Post la venko de la ĉina revolucio aperis tute nova situacio de la ludado de Ŝekspiraj dramoj. Precipe en la lastaj jaroj multiĝis Ŝekspiraj dramoj sur la ĉinaj scenejoj. En la lastaj 5-6 jaroj "Hamleto", "Otelo", "Romeo



La inaŭguro de la Unua Ĉina Festivalo de Ŝekspiraj Dramoj en Pekino



En la simpozio pri la ĉina ŝekspirologio



kaj Julieta" kaj aliaj dekelkaj dramoj sursceniĝis en Ĉinio. Ne nur en Pekino kaj Ŝanhajo, sed ankaŭ en la provincoj Gŭang-dong, Ŝanŝji, Ĝeĝjang kaj aliaj lokoj estis ludataj liaj verkoj, adaptitaj al moderna dramo kaj al baleto aŭ opero. Krome grandkvante eldoniĝis bildlibroj pri Ŝekspiraj dramoj kaj foje-re-

foje projekciigis filmoj, al kiuj oni adaptis liajn dramojn kaj kiujn oni telesendis tra la lando. En la festivalo la aktoroj sin liberigis el la studĉambro de la fakuloj kaj iris inter la ordinaraĵajn ĉinojn. Ŝekspiro mem ne plu estis rigardata kiel dio malproksima, sed homo intima.

Ĉi-foje en Ŝanhajo estis ludataj 14 dramoj en 9 teatroj kaj por 3 prezentadoj, entute 55-foje. 13 teatraj trupoj el la tuta lando tie prezentis. La trupoj plejparte estas eminentaj enlande kaj povas montri la ĉinan nivelon.

"Titus Andronicus" prezentita de la Ŝanhaja Dramaturgia Instituto estas venĝ-sanga tragedio. Ĝi estas malfacile ludebla dramo verkita de Ŝekspiro en lia frua periodo de verkado. Utiligante la bonajn kondiĉojn de la modernaj scenejoj, la reĝisoro de la tragedio montris grandiozan scenon kun 170 aktoroj, kiuj ludis animskuajn intrigojn, esprimriĉajn kiel simfonio. Ĉe la epilogo kvar korpoj mortintaj en 5 sekundoj kuŝis meze de la scenejo, dum la sceneja ĵumo sekvis la rigardon de la filo de Titus, por substreki, ke la reciproka venĝado kaŭzas nur suferojn al la ŝtato kaj popolo.

Sceno el la dramo "La Gajaj Edzinoj de Windsor"



En la festivalo la dramo "Reĝo Lear" ludata de la Popola Arta Teatro de Ljaŭning



Sceno el la dramo "Fino Bona — Ĉio Bona"



S-ro Bernard Goss (dekstre) prelegas pri Ŝekspiraj dramoj.

estis varme aplaŭdata de la spektantoj. Ĝenerale, la mondaj artistaj rondoj opinias la ludadon de "Reĝo Lear" tro malfacila pro ties poezia lingvo, facile legebla, sed malfacile prezentebla. Kiel enkorpiĝi la ideon de Ŝekspiro kaj speguli la ĉinan kulturon en la ludado, donis pli da malfaciloj al la nunaj ĉinaj aktoroj ludantaj la kortegajn figurojn antaŭ 4 jc. priskribitajn de Ŝekspiro. La maljuna ĉina aktoro Li Moĵan, kiu ludis la reĝon Lear, fine trovis la esencon de la drama arto dank' al sia studado kaj praktikado en multaj jaroj. Kiel ĉina aktoro kun apartaj trajtoj li kaptis la rolon de Lear kaj ĝuste esprimis lian karakteron.

En Pekino "Reĝo Lear", ludita de la Centra Dramaturgia Instituto, "Somermoznoka Sonĝo" ludita de la Teatra Trupo de la Ĉina Karbomineja Ensemblo, "Richard III" ludita de la Ĉina Geknaba Arta Teatro, "La Komercisto de Venecio" ludita de la Ĉina Junula Arta Teatro


k.a., ĉiuj profunde impresis la spektantojn.

Estas menciinde, ke la ĉinaj artistoj surscenigis dramojn de Ŝekspiro en formo de la antikvaj Pekina kaj Anhuĵ-a operoj kaj operoj *Kunĝju* kaj *Jŭeĝju* de Ĉinio, kio interesis la en- kaj eksterlandajn ŝekspirologojn kaj vastan spektantaron. La ĉinaj

artistoj studis kaj komprenis la Ŝekspirajn dramojn el malsamaj starpunktoj. Ili transplantis aŭ adaptis la dramojn por komplete konformigi ilin al la ĉinaj cirkonstancoj, tiel ili reduktis la animan distancon inter la ĉinaj spektantoj kaj ŝekspiraj dramoj kaj malfermis novan vojon por interŝanĝi la kulturojn orientan kaj okcidentan.

Rigardantoj de teatraj fotoj de Ŝekspiraj dramoj





Sceno el la dramo "Bonedukado al la Virinaĉo"

La Pekina Eksperimenta Opera Trupo ludis "Otelo" en formo de la pekina opero. Sur la scenejo la ĉina Otelo per laŭta voĉo montris sian malĝojegon. Per grandaj rapidaj paŝoj li esprimis koleron kontraŭ sia "malvirta" edzino. La okcident-stila lumado bone efikis sur la dekoracion. Estro de la Ŝekspirologia Instituto de la Universitato de Birmingamo diris: "Lastatempe mi kvarfoje rigardis 'Otelon', inkl. de tiu ludita en la Ŝekspira Reĝa Teatro. . . Tamen la ĉi-foja plej ĉarmas. Ĝi estas animskua kaj kortuŝa prezentado. . ."

La Tria Jueĝju-opera Trupo de Ŝanhajo prezentis "Dekdua Nokto", kiu plene montras la ĉarmecon de Jueĝju-opero. La prezentado teksis scenon ĝenerale laŭ la eŭropaj stilo kaj manieroj, tamen ne mankis gusto de Jueĝju-opero. Dume oni povis

ĝui eŭropajn popolkantojn kaj instrumentan muzikon, kaj apartaĵojn de diversaj skoloj de Jueĝju-opero. En la kantoteksto estis 7- kaj 10-ideografiaj versoj kaj ankaŭ novtipa poezio de Eŭropo.

La teatraj trupoj ĉi-foje ludantaj ankaŭ aktive studis kiel prezenti la Ŝekspirajn dramojn kun ĉinaj karakterizaĵoj. La Uhan-a Teatra Trupo ludis "La Gajaj Edzinoj de Windsor". Oni ŝanĝis la malfacile kompreneblajn humuraĵojn en facile kompreneblan lingvaĵon por la ĉinoj kaj aldonis dekelkajn strofojn por esprimi la senton, kio pliiĝis komedian etoson varman kaj leĝeran. La dramo "Antonio kaj Kleopatro" ludita de la Ŝanhaja Junula Teatra Trupo referencis la esprimmanieron de la tradicia ĉina opero, ke kortegano povas funkcii kiel generalo, kiu kapablas venki multajn malamikojn


per malgranda armeo en milito, kaj kiel kompetenta ministro en la paca periodo, kaj oni vidis, ke sur la scenejo estas 7 soldatoj reprezentantaj milojn kaj dekmilojn da armeanoj de Romanio kaj Egiptio.

En la simpozio okazinta en la festivalo la brita reĝisoro Bernard Goss faris raporton pri "Neanglaj Ŝekspiroj Reĝisoritaj en Diversaj Landoj". Li opiniis, ke oni ne devas rigardi Ŝekspiron kiel dion kaj li apartenas al la teatroj kaj spektantoj. Multaj aktoroj kaj reĝisoroj atentis nur la lingvan ritmon kaj vortojn de roloj, ignorante la impreson de la spektantoj, tiel ke Ŝekspiro foriĝis de la ordinaraj popolanoj.

Ĉi-foje la Ŝanhaja Popola Arta Teatro prezentis "Bonedukado al la Virinaĉo" reĝisorita de Bernard Goss.

En la kunveno la fakuloj kaj reprezentantoj diskutis pri la reĝisorado de iuj Ŝekspiraj dramoj. Ekz. ili donis opiniojn pri "Perdita Amafero" ludita de la Ĝjangsu-a Teatra Trupo. Iuj akre kritikis, ke sur la scenejo aperis longdistanca telefono, diktafono, motorciklo, aviadilo kaj aliaj modernaj rekvizitoj, opiniante, ke tio faras Ŝekspirajn dramojn ŝokaj, dum aliaj opiniis, ke estas utile adapti la dramojn al la moderna vivo.

La Unua Ĉina Festivalo de Ŝekspiraj Dramoj metis belan ponton ligantan Ŝekspiron kaj la ĉinan popolon. Nun pasis la festivalo, tamen multaj ankoraŭ estas ravitaj de la Ŝekspiraj dramoj. Ŝekspiro fariĝis diskutata temo de la ĉinoj. Trafe diris Caŭ Ju, fama ĉina dramisto kaj prezidanto de la Ĉina Ŝekspirologia Societo: "Estas senfina la rakonto de Ŝekspiro kaj ankaŭ nia ludado ne trovas sian finon."



Sceno el Kunĝju-opedo "Sangoŝuldo", adaptaĵo de "Macbech"

Sceno el la dramo "Richard III"





Sceno el la dramo "Titus Andronicus"

Sceno el la pekina opero "Otelo"



Sceno el la dramo "Rego Lear"



Sceno el la dramo "La Komercesto de Venecio"

Sceno el Jüëĝju-opero "La Vintra Rakonto"





Bajuĉjŭan-haveno en konstruado

MALFERMITAJ URBOJ

Jingkoŭ—la dua granda pordo de nordorienta Ĉinio

En la Fabriko de Muzikiloj "Dongbei"

de GE SI

Fotoj de ĈJU ŬEJBO

Laboristinoj de la Jingkoŭ-a Trikejo faras eksportajn vestojn.



La urbo Jingkoŭ de Ljaŭning-provinco, ĉe la nordorienta bordo de Ljaŭdong-golfo de Bohajmaro, estas unu el la 15 ĉefaj marbordaj havenurboj de Ĉinio kaj la dua granda komerca haveno de la tri provincoj de nordorienta Ĉinio, post la urbo Daljan. Ĝi sidas ĉe la enfluejo de Ljaŭhe-rivero, unu el la 7 grandaj riveroj de Ĉinio, larĝas 50 kilometrojn de oriente okcidenten kaj longas pli ol 110 kilometrojn de sude norden. Ĝi havas la guberniojn Jingkoŭ kaj Gajŝjan kaj la kvartalojn Ĝanĉjan, Ŝjiŝi, Laŭbjan kaj Bajučjŭan, kun pli ol 1 900 000 loĝantoj, el kiuj 456 000 estas urbanoj.

Jingkoŭ estas riĉa je mineraloj en la ĉirkaŭaĵo, inter kiuj estas magnezito, kies rezervokvanto okupas la unuan lokon en la mondo, talko kaj boro, kies rezervokvantoj okupas respektive la unuan lokon en Ĉinio, kaj aliaj 24 mineraloj. La urbo havas diversajn industriajn entre-

prenojn kaj havas bazlokojn de fruktoj, akvoproduktaĵoj kaj rizo de Ljaŭdong-duoninsulo. Same kiel la urbo Daljan, malantaŭ Jingkoŭ estas vastaj tri provincoj de nordorienta Ĉinio kaj orienta Interna Mongolio, kaj ĝia tera trafiko estas pli oportuna ol tiu de Daljan. Se oni eksportas el Jingkoŭ varojn, oni povas ŝpari 2-3 jŭanojn por ĉiu tuno. Jingkoŭ havas du havenojn, vastan perspektivon de disvolviĝo kaj bonajn kondiĉojn por malfermiĝi al aliaj landoj.


En 1981, laŭ la favoraj kondiĉoj de Jingkoŭ, la ŝtato sankciis, ke Jingkoŭ estu sinteza bazloko de eksportaj varoj. En septembro de 1984, la ŝtato sankciis, ke la havenurbo estu malfermita al fremdlandaj ŝipoj. En marto de 1985, la ŝtato sankciis ankaŭ, ke ĝi ĝuu iujn rajtojn de marborda urbo, tiel ke Jingkoŭ fariĝis la 15-a marborda urbo malfermita al aliaj landoj.

En la ĉina ekonomia reformo, la pord-malferma politiko pros-


perigis la urbon. La malnova haveno de Jingkoŭ kun historio de pli ol 100 jaroj estis famkonata bona komerca haveno en la Oriento en la mondo. Ĝia plej granda ŝarĝ-malŝarĝa kvanto atingis 2 600 000 tunojn da varoj. Tamen, antaŭ la malfermo la malnova haveno dronis en granda malprospero pro diversaj kaŭzoj, ke ĝia jara ŝarĝ-malŝarĝa kvanto ĉiam variis inter 200 000-300 000 tunoj. Post kiam oni malfermis la havenon al fremdlandaj ŝipoj en septembro de 1984, abrupte pligrandiĝis ĝia ŝarĝ-malŝarĝa kvanto. En la jarfino la kvanto atingis 490 000 tunojn kaj en 1985 890 000 tunojn. La interezo pli-ol-2-oble superis tiun de 1984. La malfermo de la haveno al fremdlandaj ŝipoj prosperigis la urbon. Antaŭe, la produktado de magnezito kaj talko estis malprospera. Post la malfermo de la haveno altiĝis la eksporta kapablo, rapide disvolviĝis la ekspluato kaj eksporto de riĉfontoj en la tuta

Nova strato






Kontrolistinoj de la Jingkoŭ-a Tekstila Fabriko



Ĉinaj kaj japanaj teknikistoj

regiono. En 1985 la eksportitaj mineraloj kreskis 60% pli multe ol tiu en 1984 kaj pli-ol-3-oble kreskis la mara kaj tera transportaj kvantoj de varoj. Krome, la haveno Jingkoŭ plenumis parton de la tasko por la haveno Daljan. Nur en la lasta jaro ĝi akceptis pli ol 130 eksterlandajn ŝipojn malpli-ol-5 000-tonelajn kaj ĝuas renomon en mondaj marnavigaj rondoj pro sia rapida ŝarĝ-malŝarĝo de ŝipo. Post kiam ree kaj nove konstruiĝis ok ankrejoj en la kuranta jaro, la ŝarĝ-malŝarĝkvanto de la malnova haveno kreskos al ĉ. 3 000 000 tunoj.

La malfermo de la haveno stimulis enkondukon de avangardaj teknikoj, pligrandigis la ekonomian kaj teknikan kunlaboron kaj interfluan de Jingkoŭ kun fremdaj landoj kaj rapidigis teknologiajn reformojn kaj progreson de la lokaj industrioj. En tiaj enkonduko kaj reformo oni disvolvas ĉefe poreksportajn entreprenojn kaj produktaĵojn, funkciigas entreprenojn de trikotajoj, hejmaj elektroaparatoj, muzikiloj, novtipaj konstrumaterialoj, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, kaj unue ekspluatas krudajn materialojn, novajn teknologiojn kaj produktaĵojn. Ili enkondukas avangardajn teknikojn ĉefe kun



Laboristoj faras lavmaŝinojn kun marko "Amikeco".

la normo, ĉu la produktaĵoj havos debiton en la internacia merkato, kio akcelas la novigon de produktaĵoj kaj plifortigas ilian konkurencon kapablon en la internacia merkato. En enkonduko de eksterlandaj avangardaj teknikoj, la Jingkoŭ-a Lavmaŝina Fabriko kreis sian originalan "Jingkoŭ-an metodon", t.e., kiam oni aplikas alilandajn teknikojn por ekipi sialandajn entreprenojn, 90% de la ekipaĵoj estas fabrikitaj de Ĉinio mem, oni enkondukas ŝlosilajn ekipaĵojn kaj teknikojn kaj ankaŭ sciencajn administrajn metodojn. Dume ili traktas kontraktojn kun eksterlandaj komercistoj surbaze de reciproka utilo kaj favoro. Per tio oni ne nur ŝparas monon, sed ankaŭ kulturas por siaj entreprenoj teknikajn fortojn. En la pasinta jaro post la malfermo al aliaj landoj, Jingkoŭ akceptis 389 eksterlandajn grupojn el 3 300 personoj, kiuj venis por trakti komercajn aferojn. Surbaze de la egalrajta principo kaj reciproka utilo, estis traktitaj pli ol 70 kontraktoj.

La unujara malfermo de Jingkoŭ jam akiris rimarkindan efikon en disvolvo de la kampara komerca ekonomio, reguligo de la agrikultura strukturo kaj fonda de urbo komerca, industria kaj agrikultura. Nun, en la du gubernioj kaj unu kvartalo jam konstruiĝis 18 eksportaj bazlokoj por agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. En la tuta regiono estas bazlokoj por eksportaj mineraloj, greno, oleo, akvoproduktaĵoj, fruktoj, vestoj, metiartaĵoj ktp. Ĝi eksportas produktaĵojn de pli ol 200 specojn al 55 landoj kaj regionoj. Laŭ statistiko, en 1985 la eksport-kaj aĉetkvanto de pomoj, lutreolaj feloj, plumoj kaj lano de longharaj kunikloj pluroble kreskis, kompare kun tiu antaŭ la malfermo.

La malfermo de Jingkoŭ forte influis ankaŭ siajn internajn partojn. La provincoj Hejlongĝiang kaj Ĝjilin kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio prenas Jingkoŭ kiel la duan Daljan kaj sendis fakajn delegaciojn al la urbo por interkonsiliĝi pri eksportado de grenoj, lokaj kaj brutaj produktaĵoj kaj pri kuna konstruado de doko, ŝiparoj ktp.

La malferma politiko antaŭenpuŝis la konstruadon de Jingkoŭ. En la nova haveno Bajĉjŭan, unu el la 70 ĉefaj ŝatataj konstruaj objektoj kaj distanca de la urbo je 45 kilometroj, konstruiĝos apartaj doko de karbo, varoj, grenoj, manĝeblaj oleoj, konteneroj ktp. La karba doko kun ŝarĝa povo de 5 000 000 tunoj, kiu ekfunkciis je la 1-a de julio, kurantjare, estas la unua mara doko en Ĉinio povanta aŭtomate ŝarĝi kaj malŝarĝi ŝipon kaj ĉiujare donos profiton de 6 miliardoj da jŭanoj al nordorienta Ĉinio. Post plenumo de la duaperioda konstruo en 1990, ĝia jara ŝarĝ-malŝarĝa kvanto de karbo

atingos ĉ. 17 000 000 tunojn, sed ĝia ekspluatebla povo estas 40 000 000 tunoj. Tio multe akcelos la eksteran komercon kaj ekonomian konstruadon de nordorienta Ĉinio.

Post la malfermo de Jingkoŭ la urba konstruado rimarkinde disvolviĝis. Oni konstruis novajn kaj rekonstruis nunajn stratojn, instalas 9 000-metran akvodrenan tubaron kaj funkciigas la pasaĝeran vagonaron al Ŝenjang. Jingkoŭ-hotelo kaj Ljaŭhe-hotelo estas finkonstruitaj kaj atingis la "tristelan" nivelon. La centralo kun 10 000 program-regaj aŭtomataj telefonoj, enkondukita de eksterlando, estos muntita kaj transdonita al uzado en la fino de la kuranta jaro. La nova Lengjansi-parko malfermiĝis al la publiko la 1-an de julio, ĉi-jare, la konstruo de la Okcidentfuorta Parko kaj baldaŭ komenciĝos la konstruado de la Marborda Banejo. La urbo Jingkoŭ fariĝas civilizita havenurbo kun avangardaj teknikoj kaj sciencoj, prospera ekonomio, rapidaj informoj kaj oportuna trafiko.

Konstruado de nova karbokajo



Dejortabelo

En vilaĝo de la provinco Ĝjangŝji vivas maljunulino Hŭang Fengĝjaŭ, kiu havas nek filon nek filinon. Sur ŝia pordo estas gluita okulfrapa dejortabelo. La tabelo tekstas jene: "Hŭang Fengĝjaŭ paraliziĝis je duona korpo kaj ne povas ellitiĝi. Por bone flegi ŝin, ni aranĝas dejorantojn laŭvice kiel jene..." La nomoj de la 27 familiestroj de la vilaĝo estas sur la tabelo.

Hŭang Fengĝjaŭ estas 80-jara. La 16-an de aŭgusto de la pasinta jaro, kiam ŝi estis revenanta hejmen de najbara vilaĝo, ŝi falis teren pro apopleksio. Ŝi troviĝis en danĝero. Por savi ŝin, vilaĝestro Liŭ Ĝifa tuj portis ŝin al hospitalo kune kun aliaj vilaĝanoj. La maljunulino eldanĝeriĝis, sed paraliziĝis kaj havas malfacilon en sia vivo. Liŭ memvole prenis sur sin la taskojn venigi kuraciston, alporti medikamentojn, dekokti kuracherbojn kaj fari flegadon. Informiĝinte,

la vilaĝanoj lin helpis aktive. Ili tion faris el sia propra iniciativo, tial foje eĉ kelkaj vilaĝanoj samtempe portis manĝaĵojn al ŝi, foje eĉ neniu akurate portis al ŝi manĝaĵon aŭ flegis ŝin. Por bone aranĝi la aferon, kadroj de la vilaĝo interkonsiliĝis kun vilaĝanoj kaj decidis, ke ĉiuj familioj flegos ŝin alterne unu tagon

kaj unu nokton kaj donos al ŝi manĝaĵojn trifoje ĉiutage. La dejoranto devas nokti en najbara ĉambro de la maljunulino por bone ŝin flegi. Unu el la dejortabeloj gluiĝis sur muro meze de la vilaĝo kaj la alia sur la pordo de ŝia domo. De tiam la 27 familioj akurate venas flegi la maljunulinon laŭ la dejortabelo.



KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: unu internacia respondkuponon por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Instituto geologia de Akademio de Sciencoj de Taĝika SSR planas eldoni la laŭvican 6-an volumon de fame konata esperantlingva scienca artikolaro GEOLOGIO INTERNACIA. Mendu ĉe la adreso: VO "Mejdunarodnaja kniga", ul. Dimitrova 39/20, Moskva SU-113095, USSR, aŭ en ĝiaj agentejoj situantaj en diversaj landoj de la mondo.

* La testamento de Ludwig van Beethoven (Heiligenstadt, 1802), en esperanta traduko, estas havebla kontraŭ 2 irkp. aŭ 20 nedi-

fektitaj uzitaj poŝtmarkoj de via lando ĉe: Esperanto-Info, Rudolfinergrasse 8/11, A-1190 Wien (aerpoŝto!).

* Dez. kor. kun 10- aŭ 11-jara ĉina knabino (sed nur en Esperanto!) Kornelia Behr, Koburger str. 83, 7113 Markkleeberg, GDR.

* 18-jara lernanto Edmundo Eross, Frumoasa-11, R-4135, Harghita, Rumanio, dez. kor. kun kolektantoj de pm., bk., ĉefe el Ĉinio, Japanio, Francio, USSR, esperante rumane aŭ hungare.

**ESPERANTO EN LA ĈINA
TEKSTILA UNIVERSITATO**

La Ĉina Tekstila Universitato en Sanhajo, la plej granda urbo de Ĉinio, ekfunkciigis nedevigan kurson de Esperanto en la unua duono de 1986. Ĝi estas la kvara altlernejo en Sanhajo, kie Esperanto estas instruata kiel nedeviga studobjekto post la Orient-Ĉinia Instruista Universitato, la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto kaj Fudan-universitato.

La informo por funkciigi tian kurson multe interesis studentojn en diversaj fakultatoj de la nomita universitato. Jam pli ol 800 sin anoncis por ĝin lerni. La kurso ekfunkciis la 7-an de marto, kun partopreno de pli ol 50 personoj kiel la unuaj lernantoj akceptitaj post la ekzameno. Laŭ la plano oni devas instrui 38 horojn por la unua semestro, du horojn ĉiusemajne.

La kurson subtenis la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, kies ĝenerala sekretario s-ro Sanio varme salutis la kursanojn kaj esperis, ke ili bone lernos Esperanton kaj aplikos la lingvon en la modernaj sciencoj kaj teknikoj.

**ESPERANTO-KAJTO EN
ŬEJFANG**

En la Tria Internacia Kajta Festivalo en Ŭejfang, Ĉinio, estis granda okulfrapa kajto, kiun fotis nemalmultaj ĉinaj kaj alilandaj ĵurnalistoj. Ĝin faris pli ol 20 membroj de la Ŭejfang-a Esperanto-Asocio el maldikaj lignopecoj, por la Internacia Jaro de Paco.

La kajto montras, ke la loka esperantistaro amas pacon, malamas militon kaj deziras la interkompreniĝon de la diversaj popoloj. La kajto havas formon de du ore brilaj kolomboj libere flugantaj sur la terglobo. Sur la kajto pendas du verdaj rubandoj dek-metre longaj kaj 40-centimetre larĝaj, kun Esperantaj kaj ĉinaj vortoj: "Klopodu por bela mondo".

La kajto povas longe flugi en alteco de pli ol 200 metroj super la tersurfaco. Ĝi estas elektita kiel unu el la eksponaĵoj de la festivalo.

La Tria Internacia Kajta Festivalo en Ŭejfang ebligis al multaj ĉinoj kaj eksterlandanoj koni Esperanton kaj ĝian organizon. Iuj eksterlandaj amikoj deziras revidi en la venontfoja festivalo en Ŭejfang novan kajton de la lokaj esperantistoj.

**SPECIALA NUMERO DE LA
REVUO LPLP PRI ESPERANTO**

Honore al la centjariĝo de Esperanto en 1987, ni serĉas manuskriptojn por la memoriga numero de "Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-planado" dediĉita al la historio de Esperanto, ĝia nuna stato kaj ĝia estonteco. Nin aparte interesos manuskriptoj, kiuj traktas la lingvan evoluon de Esperanto, la historion de la Esperantomovado, Esperanto-literaturon, la utiligon de Esperanto en edukado kaj esploroj, la rolon de Esperanto en internaciaj organizoj, kaj sociologian sociolingvistikan analizon de Esperanto-organizoj kaj Esperantogrupoj naciaj kaj internaciaj. Proponataj tekstoj povas esti en iu ajn lingvo. Aŭtoroj bonvolu sendi tri ekzemplerojn de ĉiu manuskripto, kune kun mallonga resumo de la artikolo en la lingvo Esperanto, angla aŭ franca, kaj biografieto, al d-ro Humphrey Tonkin, administra redaktoro, LPLP, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono. Manuskriptoj devas atingi tiun adreson ĝis la 30-a de septembro 1986. Ĉiu manuskripto estos recenzata de almenaŭ du redakcianoj de LPLP.

Oni antaŭvidas, ke tiu numero formos parton de volumo 11 (1987) kaj aperos en la aŭtuno de 1987.

**EVA KONTROLOS
MANUSKRIPTOJN**

Laŭ pluraj petoj la Esperantlingva Verkista Asocio decidis entre-

(Daŭrigota sur P. 28)

La granda kajto farita de la Ŭejfang-a Esperanto-Asocio por la Internacia Jaro de Paco

Rezervejo por makakoj

Sur la duoninsulo Nan'ŭan (11°00'E, 18°24'N) de la sud-orienta Hajnan-insulo, Ĉinio estas rezervejo por makakoj, kun jara meznombrata temperaturo de

25.2°C. Sur ĝi etendiĝas de oriente okcidenten monto longa 15 km. kaj larĝa 0.6 km. La plej alta montpinto 255 metrojn super la marnivelo dividas la monton en

partojn orientan kaj okcidentan, ĉiu kun ĉ. 20 diversgrandaj montĉenoj kaj dekoj da valoj. Tie punktiĝas kavernoj kaj ŝtonfendoj, fontas fluoj kaj pompe kres-



Ludo kun makakoj

kas arboj fruktodonaj. Ĝi estas ideala loko de vivo, ludo kaj nutraĵo-serĉado por makakoj, birdoj kaj bestoj.

La rezervejo estis starigita en 1965. Ĝiaj laborantoj faris longtempan observadon kaj esploron pri la ekologio de la makakoj. Je la fino de 1982, ili konstatis post esplorado, ke tie vivas 19 gregoj el sume pli ol 900 makakoj. Ili ne nur havis sisteman konon pri la rasa konsisto, vivsfero, agado, fekundiĝo, nutraĵo kaj lingvo de la makakoj, sed ankaŭ faris kampan dresadon al iuj makakoj.

Ĉirkaŭ la deka antaŭ ĉiu tagmezo en- kaj eksterlandaj turistoj

kolektiĝas ĉe la observejo kaj atendas alvenon de makakoj. Dresisto kun nutraĵo venas antaŭ rokaron ĉirkaŭitan de arboj, kie li manĝigas makakojn. Li fajfas al la montĉenoj ambaŭflanke kaj laŭte krias: "Venu, venu, venu!" Resonas fajfado kaj kriado inter montvaloj. Post momento oni povas vidi, ke skuiĝas arboj en foraj montĉenoj kaj de tie elsaltas makakoj.

Kiam la makakoj alproksimiĝas al la ĉirkaŭaĵoj de la nutrejo, ili fariĝas singardemaj. Sin kaŝante en altaj branĉoj, ili observas la ĉirkaŭaĵojn de la nutrejo. Ordinare, kuraĝa makako unue ŝtele alvenas por preni manĝa-

ĵon. Post kiam ĝi sekure resaltas sur branĉon, la aliaj makakoj rimarkas tion sendanĝera, ili do ĵetas sin unu post alia al la loko kaj ŝovas manĝaĵon en la buŝon alterne per la manoj. Pleniginte la vangajn saketojn per la manĝaĵo, ili kuras returne al branĉoj. Kiam ili atingas sekuran lokon, ili elprenas la manĝaĵon el la saketoj kaj komencas manĝi malrapide. La maniero de ilia manĝado ridigas la rigardantojn fojerefoje.

Makakoj estas societemaj. Ili vivas en grego el dekoj da junaj kaj maljunaj, viraj kaj inaj makakoj, gvidata de unu ĉefo. El la 19 gregoj unuj vivas ĉe mont-



Makakoj sur branĉoj

supro, aliaj ĉe monttalo kaj la ceteraj ĉe montvaloĵoj. Inter ili malofte okazas batalo. Nun la dresitaj makakoj aktivadas ĉirkaŭ la nutrejo.

Sen helpo de dresisto la turistoj povas facile trovi reĝon de makakoj. La alta kaj fortika reĝo, kun ruĝa vizaĝo kaj brilaj okuloj, havas akrajn dentojn kaj alte levitan voston, kio montras ĝian dignon. Reĝo de makakoj estiĝas post interbatalo. Ĉiujare, dum la oestra periodo, kelkaj fortikaj virmakakoj de unu gregoj intense batalas unu kontraŭ alia por konkeri makakinojn de la gregoj. Post ripetada luktado la plej fortika makako fariĝas ĝia reĝo. Nature, estas malfacile reĝiĝi duafoje.

En gregoj estas maljunaj kaj senhelpaj makakinoj, nove naskitaj makakidoj, petolemaj kaj akcident-estigaj virmakakidoj, belaj kaj teneraj makakinoj kaj malicaj kaj fortikaj virmakakoj. Sen protekto, regado kaj punado de la reĝo, la gregoj ne povus ekzisti. Tial la reĝo ĝuas grandan

rajton kaj la makakoj submetiĝas al ĝi senescepte. En batalo kontraŭ alia gregoj iras tre intensa luktado inter virmakakoj, makakinoj, makakidoj kaj makakoreĝoj respektive. Ili saltante mordas unu alian kun kriado. Sed la batalon decidas la reĝoj. La venkinta reĝo gajnas la bata-

lon, kaj la venkita reĝo devas fuĝi for kun siaj makakoj.

La dresitaj makakoj havas bonan rilaton kun homoj. Ili ofte petas de turistoj manĝaĵon. Je tio la reĝo ĉiam la unua eliras al la turistoj. Starante antaŭ turistoj, ĝi prenas el lia mano arakidon, bananon k.a. Sekvante ĝin, an-

Makakoj petas manĝaĵon.





kaŭ la aliaj makakoj venas al la turistoj por peti manĝaĵon. La makakoj estas tro petolemaj. Kvankam ili povas facile preni manĝaĵon el la mano de ĉiu turisto, tamen ili ankoraŭ rabas unu de alia por akiri manĝaĵon, kio vekas ridon ĉe rigardantoj.

Iu timemulo ĵetas arakidon al makako. Jen ĝi fiksas la rigardon sur la manĝaĵo, lerte eksaltas kaj

kaptas ĝin en aero per mano. Iuj makakinoj kun ido en la sino ne povas manĝi ĝissate, kiam la dresisto donas manĝaĵon. Tial, ili iras antaŭ la turistoj tien kaj reen, esperante, ke oni kompatu ilian idon. Kaj ankaŭ turistoj volonte donas al ili manĝaĵon. Pli kuraĝaj makakoj eĉ serĉas manĝaĵon permane en poŝo aŭ sako de turistoj. Se turisto ne kontentigas la

deziron de iu makako aŭ ofendis ĝin, ĝi do fiksas la rigardon sur li, terure kriante "He, he, he!" Tiam estas pli bone tuj ĵeti al ĝi manĝaĵon, alie ĝi ĵetos sin al la turisto kaj lin vundos. Kompreneble, multaj makakoj estas mildaj al homoj. Kiam ili satmanĝinte forlasas la nutrejon kune kun la reĝo, ili krias "Ji, ji, ji!" al la rigardantoj eble por ilin saluti kaj adiaŭi.

(Daŭrigo de p. 25)

preni fakan kontroladon de manuskriptoj, ĉu laŭ peto de la aŭtoro aŭ de la eldonisto.

La kontrolkomisiono de EVA funkcios sub la gvidado de akademiano Reto Rossetti, kaj partoprenos ĝin tridek diverslingvaj verkistoj kaj lingvistoj. La kontrolado koncernas ĉefe la kampon de gramatiko, sintakso kaj semantiko, ne tuŝante la stilon, krom eventuale per konsiloj, kaj laŭ peto de la aŭtoro.

Objekto de lingva kontrolo povas esti originala verko same kiel traduko. La kontrolo rajtigas al la signo "Lingve kontrolita de EVA".

La kontrola laboro estos honorariata laŭ du tarifoj, depende de la loĝloko de la paganto: Tarifo A por landoj kun alta vivnivelo, kaj tarifo B por landoj kun malalta vivnivelo.

A. Manuskripto el 20 paĝoj aŭ malpli: 10 guldenoj aŭ 20 irk. Ĉiu plia paĝ-dudeko: 5 guldenoj aŭ 10

irk. Do verko 100-paĝa kostas $10 + 4 \times 5 = 30$ guldenoj. Por ĉiu plia cento da paĝoj: 20 guldenoj.

B. La favora tarifo estas duono de la A-tarifo.

En esceptaj kazoj oni povas interkonsenti pri pago per ekzempleroj de la libro aŭ aliaj libroj.

Interesatoj bonvolu sin direkti en letero kun detalaj sciigoj al la gvidanto de la Kontrolkomisiono de EVA, Mag. Reto Rossetti, 2 Elmwood Crescent, LUTON Beds. LU2 7HX, Britujo.

Ok sanigaj ekzercoj (IV)

(Daŭrigo)

III. Ekzercado de okuloj

A. Turnado de okulgloboj. Sidu en ĝusta pozo kaj fiksu la rigardon antaŭen, kun kolo kaj talio rektaj. Turnu la okulglobojn 5-6 fojojn maldekstrume kaj poste fiksu la rigardon antaŭen momenton. Turnu la okulglobojn 5-6 fojojn dekstrume kaj rigardu antaŭen momenton. Serioze faru la ekzercojn po unu fojon ĉiumatene kaj ĉiuvespere.

B. Frotado de okuloj. Duonpugnigu la manojn kun dikfingroj fleksitaj. Frotu per la dorsoj de la dikfingroj la suprajn palpebrojn dekelkajn fojojn (Bildo 17). Premante la tempiojn dekstran kaj maldekstran per la dikfingroj, turne knedu ilin 10 fojojn kaj poste samfoje en la kontraŭa direkto. Fine pinĉu la glabelon dekelkajn fojojn per la dikfingro kaj montrofingro de la dekstra mano kaj samtempe frotu mal-supren de la okcipito ĝis la nuko dekelkajn fojojn per la maldeks-



Bildo 17



Bildo 18

tra mano. Faru la samon per la alia mano dekelkajn fojojn en la sama maniero (Bildo 18). Faru la ekzercojn kun okuloj indifere-fermitaj aŭ malfermitaj.

La funkcio de la okuloj havas rilaton kun la internaĵoj. La okul-frotado povas vigligi la funkcion de la okuloj elastigi la muskolojn kaj malfruigi la palpebran ptozon. Cetere, ĝi ankaŭ

preventas miopecon kaj hipermetropecon.

La okul-frotado vigligas la vitalan kanalon ĝinlŭo, rezistas kontraŭ malvarmo kaj kuracas kapdoloron kaj kapturon. Post la frotado vi sentas vin aparte komforte.

Pinĉado de la glabelo forigas la internan varmon de la okuloj kaj preventas okulmalsanojn.

Turnado de okulgloboj fortigas okulajn muskolojn, preventas strabiĝon kaj helpas la ciliran muskolon reguligi la kristalanan konveksecon, sekve ĝi povas forigi la okulnan laciĝon kaj preventi miopecon kaj hipermetropecon. Turnado de okulgloboj ankaŭ akcelas sangan cirkuladon en la orbitaj histoj kaj vigligas la funkcion de la optaj kaj okulmotoraj nervoj kaj okulaj muskoloj, tial ĝi povas evitigi okulajn malsanojn. Kiu ekzercas sin ĝis maljuniĝo, al tiu ne okazas evidenta kaviĝo de la orbitoj.

(Daŭrigota)


KORESPONDI DEZIRAS

- * 26-jara usonano interesiĝas pri, inter aliaj, paco, sciencfikcio, fervojo kaj alilanda vivo. Ĉu vi volas esti mia amik(in)o? S-ro Charles E. Galvin Jr., Post office Box 29341, Oakland California 94604-9341, Usono.
- * Vitold Slomczynski, str. Kasztanowa 47/12, PL 85-605 Bydgos-

zcz, Pollando, volus korespon-di kun tuta mondo pri ĉiuj temoj.

- * Filatela Kooperativo interŝanĝos ĉiun nombron da pm. pri floro, faŭno, arto, sporto, ktp. Serion kontraŭ serio. Specialaj mendoj pri valoraj filatelaĵoj per antaŭa interkonsento. Filatelista Kooperativo, Jacek Krassowski, 65-958 Zielona Gora 8, P.K. 166, Pollando.

- * Mi dez. informojn/bildojn de ekstereŭropaj kuŝbicikloj kaj povas sendi konstruplanon por bona trirado. Gerhard John, Soderstr 114, 6100 Darmstadt, FR Germanio.



Ĉengde, “ĉefurbo” norde de la Granda Muro

Komence de la 18-a jarcento Kangŝji, imperiestro de Ĉing-dinastio, konstruigis palacon en Ĉengde 250 kilometrojn nord-oriente de Pekino por defendi la teritorion. La konstruado daŭris 87 jarojn. Oni nomis la palacon Someruma Montvilao, kiu servis al la grava politika aktivado de Ĉing-dinastio dum unu kaj duona jarcentoj, kaj tiel Ĉengde fariĝis la dua politika centro de Ĉing-dinastio kaj nomiĝis “ĉefurbo” norde de la Granda Muro.

La urbo ĉirkaŭita de montaroj situas en la nordorienta parto de Hebej-provinco. Ulje-rivero trafluas ĝin de nordo al sudo kiel arĝenta rubando. Tie montoj, akvoj, arbaroj kaj fontoj estas belaj kaj klimato modera. La Someruma Montvilao, la Eksteraj Ok Temploj kaj la ĉirkaŭaj groteskaj pintoj kaj rokoj kunfandiĝas en belan pejzaĝon, kaj konsistigas turisman lokon en granda spaco.

La montvilao en la norda parto de la urbo ĉirkaŭita de dek-kilometre longa muro, kovras areon de 5 640 000 kvadrataj metroj, duoble kiom la Somera Palaco en Pekino, kaj estas la plej granda el la imperiestraj ĝardenoj nun ekzistantaj en Ĉinio. Ĝi estas dividbla en du partojn: palacan domaron kaj pitoreskejon. La palaca domaro impresas ne tro lukse, sed ĉarmas per natura belo kaj portas la originalan stilon de antikva simpleco.

La palacaj domoj sin trovas inter ĉielskrapantaj antikvaj pinoj en la sudorienta parto de la mont-

vilao. Estas rigardindaj la domoj, kiujn imperiestroj de Ĉing-dinastio uzis por trakti ŝtatajn aferojn, okazigi solenojn, studi, loĝi kaj akcepti vizitantojn, kaj la domoj konstruitaj speciale por iliaj edzinoj. En arkitektura stilo tiuj palacaj konstruaĵoj sur malaltaj bazamentoj estas tute malsamaj ol tiuj de aliaj luksaj palacoj. Iliaj brikoj kaj tegoloj estas grizaj, ne kolorigitaj kaj glazuritaj, kaj ilia simpla stilo bone harmonias kun la tuta montvilao.

En la pitoreskejo estas lago, ebenaĵo kaj montoj. La lago situanta en la norda parto de la palacaj domoj estas la pejzaĝa centro abunda je antikvaj konstruaĵoj kaj insuletoj interligitaj plejparte per pontetoj. En somero kaj aŭtuno tie ĉarmas variaj pejzaĝoj, prosperas floroj kaj verdas arboj, kio similas al pitoreskejoj en suda Ĉinio. Estas alloga Termo-rivero nur 700 metrojn longa. Termo-fonto, unu el ĝiaj fontoj, troviĝas norde de la lago. La fontakvo estas kristale klara. En frosta vintro glaciĝis la riveroj en norda Ĉinio, sed ĝi ankoraŭ flustras. Matene la lago kun nebulo super si prezentas mirindan vidaĵon.

Norde de la lago estas vasta ebenaĵo. Origine tie estis dek tri konstruaĵaroj. Tie verda herbejo estas punktita de mongolaj jurtoj, simile al paŝtejo. En tiu loko imperiestroj de Ĉing-dinastio akceptis Banĉen la VI-an, la lamaisman ĉefon en Tibeto, kaj George McCartney, la britan specialan sendi-

de MU ĈENGJE

ton. Inter la konstruaĵoj estas Ŭengin-pavilono, kie estis konservitaj valoraj volumoj de la antikva Ĉinio “Si Ku Ĉjŭan Ŝu”.

En la nordokcidenta parto de la montvilao ondas montoj abundaj je valoj, kiuj konsistigas ĉ. kvar kvinonojn de la montvilao. En kvietaj valoj susuras pinoj, kantas birdoj, murmuras fontakvo, vagas cervoj kaj dancas gruoj. Estante tie, vi sentas vin en kvieta medio. Tie 44 vidindejoj imponas en la valoj kun kalejdoskopa natura belaĵo.

Nordoriente de la montvilao kuŝas grandaj temploj sur montodeklivo. Siatempe ili estis administrataj en ok lokoj kaj situantaj ekster la “ĉefurbo”, tial ili ricevis la nomon Eksteraj Ok Temploj. Origine estis dek du temploj, nun restas nur sep. Tiuj temploj estis konstruitaj de 1713 ĝis 1780. Tiam Ĉing-dinastio praktikis moligan politikon al la nacimalplimultoj. Laŭ ilia religia kredo ĝi konstruigis templojn en iliaj arkitektura, skulpta kaj pentra stiloj. Tiuj temploj donas impreson, ke cent riveroj fluas en maron kaj sennombraj steloj subtenas la lunon kun Someruma Montvilao kiel la akso.

La templo Putŭozongĉeng kun areo de 220 000 kvadrataj metroj estas la plej granda en skalo. En 1767 imperiestro Ĉjanlong konstruigis ĝin por akcepti nacimalplimultajn altrangulojn el Mongolio, Ĉinghaj, Tibeto kaj Ŝingĵang venintajn por festi lian naskiĝtagon. La templo estas imi-

taĵo de Potala-Palaco en Tibeto, kaj pro tio ĝi ricevis la nomon Malgranda Potala. Ĝi montras la arkitekturan stilon de la tipaj antikvaj konstruaĵoj de la tibeta nacieco. Nordoriente de la montvilao elstaras Puning-templo, konstruita en la regperiodo de Ĉjanlong por rememorigi pri la venko super ribelo de armeo de Ĝungar. Meze de la ĉefa konstruaĵo, la halo Daĉeng, staras giganta statuo de milbraka kaj milokula bodisatvo Avalokites-


vara kun alteco de 22.28 metroj, talimezuro de 15 metroj kaj pezo de 140 tunoj. Ĝi, bela kaj ĉarma, estas valora religia artaĵo.

Krom la pejzaĝoj de la Some-ruma Montvilao kaj la Eksteraj Ok Temploj, estas ankaŭ multaj montoj ĉirkaŭ la urbo, en malsamaj formoj, ekz. la Klaba Monto, la Rana Roko, la Arhata Monto, la Kokkresta Monto, la Monahĉapa Monto, la Ĉielponta Monto kaj la Pagodo-para Mon-

to. Pri tiuj majstraj naturaj verkoj cirkulas belaj legendoj, kiuj aldonis al la urbo pli da mistero.

En la urbo servas la hoteloj Ĉengde, Ŝanĝuang, Ŝinhŭa kaj Jurta Hotelo Ŝanĝuang. Ĉjiuang-loŭ-hotelo nove konstruita ĉe la muro de la montvilao prezentas antikvan arkitekturon. Rigardante norden en la alta loko de la hotelo, oni vidas la senfinan akvon kaj kontinuan montĉenon. Turninte la rigardon suden, oni

Ĝinŝan-monto ĉe la lago





Jurto-hotelo Sanĝüang

havas panoraman vidon al la urbo. La hotelo estas en la gusto de antikveco, kun luksaj mebloj. Ĝia korto abundas je rokaĵoj, floroj, arboj kaj herboj. En la hotelo la gastoj sentas sin kvazaŭ en fea lando.

Por akcepti pli da turistoj, oni malfermas novan turisman lokon ĉiujare en la urbo. Ekz. en Ĉing-feng-bazaro oni rekonstruis straton en Ĉing-dinastia stilo kaj konstruos la lokon ĉe la Tang-ŝan-a Termofonto en porferian vilaĝon kaj sanatorion. La urba magistrato jam decidis starigi ĉasejon en la Norda Granda Monto kun tre multaj bestoj 70 km. for de la urbo.

Se vi volas gustumi pladojn el ĉasaĵo, iru do al Ĉengde, kie oni preparas diversajn pladojn ĉiu kun aparta gusto, kiaj frikasita

cervaĵo, frikasita fazanaĵo, dolĉa kaj acida apraĵo, frikasita lepuraĵo kaj fritita pasero. Se vin interesas etmanĝaĵoj kun loka gusto, gustumu ilin surstrate. Troviĝas en la urbo almenaŭ cent specoj de etmanĝaĵoj, el kiuj iuj eĉ rilatas al la imperiestra familio de Ĉing-dinastio, ekz. "freŝroza krespo", kiun la imperiestro Ĉjanlong ŝatis kaj per kiu li regaligis alilandajn senditojn kaj nacimultajn nobelojn, poste la manĝaĵo disvastiĝis en la popolo. La bongusta ĵehe-kuko estis propra al la popolo kaj poste enkondukita en la palacon. Ĝi estis ĉiutage necesa por la palaĉaj menuoj.

La urbo havas multajn specojn de lokaj produktaĵoj kaj abundajn riĉfontojn. Ĝiaj kratagfruktoj, abrikotaj kerno, juglan-

doj kaj kaŝtanoj havas debiton en- kaj eksterlande. Estas bonvenaj ĝiaj turismaj memoraĵoj, kiel brokato, silkaĵo, historiaj objektoj (kopiaĵoj), kaligrafiaĵoj, pentraĵoj kaj lignaj skulptaĵoj.

SOLVO POR TESTO DE INTELIGENTECO


Matene de somero la vegetaĵoj post serena nokto senescepte surhavas roson. El la kvin floroj kvar transformitaj el demonoj tranoktis tie kaj nepre surhavis roson. Sed matene la knabino ankoraŭ kantis kaj post la kanto ŝi fariĝis rododendra floro, kiu, kompreneble, ne havis sur si roson. La junulo asertis, ke nur la floro sen roso estas ŝia transformiĝinto. Jen li sukcesis.



La templo Putūozongcēng en malproksimo





*Ligna statuo de
la milbraka kaj
milokula bodi-
satvo Avalokites-
vara*



Montoj de Ĉengde

La halo Daĉeng de Puning-templo





Ĉe lago

Pladoj el ĉasaĵo kun aparta gusto



Lokaj metiartaĵoj por turistoj





Blue glazuritaj florzvoj

PRIFOSADO DE DADU, LA ĈEFURBO DE JŪAN- DINASTIO

de GŪAN ĜIN

Bludesegna plata kruĉo kun taso sur pletoj



La arkeologia prifosado de la mond-fama urbo Pekino estas unu el la gravaj taskoj de la ĉinaj arkeologoj. Jam en la 13-a jarcento Pekino estis prospera urbo, tiam ĝi nomiĝis Dadu kaj estis ĉefurbo de Jŭan-dinastio. La fama venecia vojaĝisto Marko Polo en siaj vojaĝnotoj multe laŭdis ĝin, dirante: "En la urbo estas multaj loĝantoj kaj alilandanoj venantaj el diversaj mondpartoj por tributado aŭ komerco. Tial en kaj ekster la urbo troviĝas luksaj kaj grandaj domoj, krom multaj domoj de la altrunguloj." "Marmoraj ŝtuparoj ĉirkaŭ la palacaj haloj sin etendas ĝis la marmora bazamento. La vasta aŭdienco halo povas enteni multajn manĝantojn. En la palaco estas multaj konstruaĵoj lukse kaj lerte aranĝitaj kun ruĝa, verda, blua aŭ purpura tegmento. Ili en solida strukturo povas ekzisti multajn jarojn kaj la fenestroj brilas kiel kristalo." Forpasis pli ol 700 jaroj kaj la pasinta Dadu estis jam delonge kovrita de la poste konstruita urbo. Kia estis ĝia originala formo? Kiel ĝi estis konstruita? Ĉinaj arkeologoj jam plenumis tiun laboron post prifosado kaj enketado de deko da jaroj.

Laŭ literaturoj la imperiestro de Jŭan-dinastio Kublajo (de 1271 ĝis 1294 p. K. sur trono) post sia surtroniĝo prenis ĝin kiel sian ĉefurbon kaj nomis ĝin Dadu. Post sep jaroj lia palaco estis konstruita. Post pliaj du jaroj finkonstruiĝis la granda urbo. Ĝia urbo-konstruado daŭris ĝis 1359 antaŭ la disfalo de Jŭan-dinastio, kiam la fortreso kaj baskul-ponto ankoraŭ estis en konstruado.

Jam de la 60aj jaroj de la kurranta jarcento ĉinaj arkeologoj faris prospektoradon al la urbomuroj, stratoj, riveroj kaj lagoj de Dadu, prifosis pli ol dek


konstruajn ruinojn kun malsamaj tipoj kaj elterigis grandan kvanton da porcelanaĵoj kaj aliaj vivezonaj objektoj. Dank' al tio oni havis unuapaŝan konon pri la urba plano, konstruaj formoj kaj arkitekturo de Dadu kaj pri la vivstato de la tieaj diverstavaloĝantoj.

Dadu estis rektangula, ĉ. 7 600 metrojn longa de la sudo ĝis la nordo, ĉ. 6 700 metrojn larĝa de la oriento ĝis la okcidento, kun periferio de ĉ. 28 600 metroj kaj areo de pli ol 50 kvadrataj kilometroj. La imperiestra urbo situis en la centra parto de la suda urbo, la palaca urbo en la oriento de la imperiestra urbo. La vojo de la sudo al la nordo trapasanta la centran palacon estis la centra aksa linio de Dadu. Arkeologoj konstatis, ke ĝi estis la centra aksa linio de Pekino en la dinastioj Ming kaj Ĉing (1368-1911) kaj hodiaŭ. La tiamaĵ urbomuroj konstruitaj el solide ramita tero havis bazon larĝan je

24 metroj. La imperiestra urbo inkluzivis ankaŭ la nunajn Bejhaj-parkon kaj Ĝongnanhaj, la sidejon de la Centra Popola Registaro. La kastelo de Kublajo troviĝis sur Ĉjonghŭa-insulo en Bejhaj-parko. Bele ĉizita jada vazego kunportita de Kublajo al Dadu nun estas konservata en Tŭanĉeng apud Ĉjonghŭa-insulo. La tiama palaca urbo situis en la norda parto de la nunaj malnova imperiestra palaco kaj Ĝingŝan-parko, sed la skalo estis malpli granda.

En 1969, kiam oni malkonstruis la defendturon sur la urbo-pordego Ŝjiĝimen, oni mirege trovis Hejimen, unu el la pordegoj de Dadu, kovritan de la urbomuro de Ming-dinastio. Ĝi montris la grandiozan pordegon konstruitan en la 13-a jarcento. Tiu nekompleta pordego altis 22 metrojn kun suba trairejo 9.92 metrojn profunda, 4.62 metrojn larĝa kaj 5-7 metrojn alta. La bazamento de la pordega turo estis

Hejimen-pordego





Blanke glazurita telero kun bruna desegno

masonita el grizaj brikoj. Krome, oni trovis fajro-estingan instalaĵon por verŝi akvon de la turo al la subaj lignaj pordeg-klapoj por efike preventi fajran atakon de

malamikoj. La lignaj pordklapoj jam forestis, tamen ankoraŭ ekzistis duonsferaj feraĵoj kun truo por enteni la klapan pivoton kaj klap-pivotaj bazŝtonoj.

Tiam en Dadu ombris verdaj arboj kaj belis la medio, tio estis nedisigebla de la rivera kaj laga akvosistemo en la urbo. La grentransporta akvosistemo konsistinta el la riveroj Gaŭljang, Hajzi kaj Tonghuj estis grava trafika linio de Ĵuan-dinastio por transporti grenon de la sudo al la nordo. La enurba akvosistemo konsistinta el Ĝinŝuj-rivero kaj Tajje-lago estis grava konsistiga parto de la palaco kaj imperiestraj ĝardenoj. Dank' al arkeologia prospektorado oni trovis la situon de la akvosistemoj.

Stratoj de Dadu lasis spurojn en la nuna nordorienta parto de Pekino. La prospektorado montris, ke la ĉefa strato trapasinta la palacon de la nordo ĝis la sudo estis 25 metrojn larĝa. Ambaŭflanke de la ĉefa strato egaldistance viciĝis multaj strate-



Porcelana statuo de infano



Porcelana statuo de Avalokitesvara

toj de oriente okcidenten larĝaj 6-7 metrojn. Tia strata strukturo estas konservita ĝis nun.

La plej prospera kvartalo de Dadu estis proksime de la Tambur-turo norde de la nuna malnova imperiestra palaco. Tiam troviĝis tie foiroj de fruktoj, grenoj, silkaĵoj, peltaj ĉapoj, bidoj, bovoj, ŝafoj, ĉevaloj kaj muloj, kameloj, anseroj, anasoj ktp., tie ne nur kolektiĝis enlandaj diversnaciecraj komercistoj, sed ankaŭ negocis japanaj kaj okcidentlandaj komercistoj. Marko Polo en siaj vojaĝnotoj diris: "Diversaj varoj alvenas senĉese kiel rivera fluo. Ĉiutage enportiĝas silko de mil ĉaroj." "Neniu urbo povas kompari kun ĝi en tio, ke tiel multaj fremdaj valoregaj trezoroj transportiĝas en la urbon."

En prifosado de Dadu, oni trovis ruinon de granda I-forma loĝdomo kun bazamentoj, fenestra koridoro, aldona vestiblo, fronta domo, orientaj kaj okcidentaj flankaj domoj, kolona koridoro kaj aliaj. Tie elteriĝis nombro da voloraj blu-desegnaj kaj bluet-desegnaj porcelanaĵoj, lakitaj objektoj inkrustitaj per perlamoto, kristalo, purpura inkŝtono, pli ol 200 ŝakpecoj el blanka kaj ruĝa agatoj disfalintaj sur brikan plankon de la ĉefa ĉambro. En la lastaj jaroj de Ĵuan-dinastio kamparanaj insurrektoj leviĝis tra la tuta lando, el ili la Ruĝ-kaptuka Armeo estis la plej potenca. Ĝia norden-ekspedicia armeo iafaje proksimiĝis al la ĉefurbo Dadu, tiam la imperiestro kaj aliaj korteganoj falis en panikon. La malordaj raraĵoj lasitaj de la dommastro probable montris ilian tiaman konsterniĝon.

ĜU ŜIĜI:

Hazarda ripetiĝo sub purpura acero

(Mikronovelo)

Purpura strato. Ambaŭflanke de la asfaltita vojo ornamita de gazonetoj kaj florbedoj kreskis raraj purpuraj aceroj. Tre modestaj etaĝdomoj ebentegmentaj kaj kelkaj pinakloj de gotikaj preĝejoj elrigardis el maro da purpuraj floroj, kio multe plibeligis la straton kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn.

Per sia beleco la strato altiris al si multajn homojn. La junuloj en paroj sin kaŝis en la profundaĵoj de la floraroj kaj arbetoj por strebi al pli bela medio. Ankaŭ maljunuloj ne estis solecaj: ili venis en interkonsentita horo por ludi ŝakojn, fari korpokzercojn aŭ senkatene babili, kvazaŭ tie retroveblus ilia infana koro antaŭlonge perdita. Iuj aliaj venis de malproksime, kunportante fotilon aŭ pentrotabulon, kaj trovis je taŭgan angulon. Pasiginte duontagon absorbite, ili foriris kun granda kontento, ke ili povos disvastigi la belecon de purpuraj aceroj al pli multaj homoj. . .

Ŝi loĝis proksime, ĉe la suda ekstremo de la strato, en ruĝbrika etaĝdomo. Sed ŝi ne volis iri al la ĉarma strato.

La norda fenestro de ŝia ĉam-

bro estis blanke lakita. El la fenestro ŝi povis vidi la tutan straton, la florojn, la arbojn, la pinaklojn kaj la ebenajn tegmentojn, kaj ankaŭ la gajajn homojn. Kiel taŭgan lokon okupis la fenestro! Sed la mastrino de la fenestro ĉiam kovris la fenestron per kurteno de nigra veluro. . .

Ĉu ŝi timis la belecon de la loko?

Certe ne. Ŝi amis belecon, kaj ŝi mem antaŭe estis tre bela. Ŝi izolis sin de la bela strato, izolis sin de la belaj purpuraj aceroj pro tio, ke la sango de ŝia filo verŝiĝis sur la strato.

Ni fermu por ŝi la fenestron! En la fenestro iam estis feliĉa nesto. . .

Antaŭ 15 jaroj, tri "birdoj" gaje vivis en tiu ĉi nesto. . .

"Panjo, malfermu por mi la pordon, panjo. . ." ekster la pordo sonoris ĉarma infana voĉo.

"Jen mi venas, mia koro!" ŝi tuj ĝoje rapidis al la pordo demetinte la varman paton.

"Panjo, kie estas paĉjo?" ĉiam tiel demandis la filo, kiam li revenis de la lernejo.

“Paĉjo ankoraŭ ne revenas,” ŝi ĉiam respondis kun seriozeco, helpante la filon demeti la tornistron.

“Ha ha, kiu mensogas, ke paĉjo ne revenis?” Ofte estis, ke antaŭ ol ŝi fermis la pordon, la edzo jam aperis post la dorso de la filo.



Post tio certe eksplodis rido, kaj la ĉambro estis plenigita de gajeco kaj feliĉo.

Kiam la filo falis en kvietan dormon, ili duonkuŝiĝis en la lito kaj fiksis la rigardon sur la malgranda bela vizaĝo. En intima babilado iom ŝerca, ili malrapide dispecigis la tagan lacon kaj fandis ĝin en ondetojn de amo.

“He, ĉu vi timas maljuniĝi?”
“Neniom!”

“Sed kiam ni estos tiel senilaj, ke ni eĉ ne havos forton por porti glason da akvo?”

“Nenio timinda! Ni havas filon, li certe helpos nin. . .”

Kaj nun ŝi estis efektive maljuna. Ŝi maljuniĝis tro frue kaj tro rapide, kio estis kompatinda. Kaj ŝia filo ja neniam povos porti al ŝi glason da varma teo, kiun ŝi aspiris: la filo mortis, falis sub purpura acero de la purpura strato. . .

Estis printempa tago, ĉarma kaj serena tago post longa pluvado. Ŝi kaj ŝiaj edzo kaj 9-jara filo gaje kuradis sur la strato purege lavita de la pluvado, ĉirkaŭirante la verdajn arbojn kaj purpurajn florarojn. “Panjo, paĉjo, kaptu min! Vi ne atingos min!” la filo ŝvitegis pro kurado — ili ludis “venas aglo”.

Sed estis tro subite! Nigra personaŭto flugis el post griza domego maldekstre de la strato. La korŝira agaca bremssono superbruis la doloran krion de la filo, kaj subite mutiĝis la rumora strato. Ŝi furioze ĵetiĝis sur la junan ŝoforon teruritan de la akcidento kaj gratis sur lia vizaĝo: “Ĉielo! Vi redonu la filon, vi redonu! Ho ve! . . .”

La bela strato, kiu donis al ŝi ĝojon kaj belan revon, en palpebrumo forprenis de ŝi la feliĉon. De tiam ŝia amo estis entombigita, kaj la beleco forglitis de ŝia vivo, de ŝia animo. Nun ŝi estas solece rezignita en la malgranda ĉambro plena de malgajeco sude de la strato, kaj malfacile pasigis la restan tempon en turmentado de la sorto. . .

Sed kial hodiaŭ ŝi suriris la straton kiu antaŭ longe fremdiĝis al ŝi? Ŝi mem ne sciis. Eble ŝi tute ne konsciis pri sia eliro. Ŝia meĥanika paŝado tremis en amaro. La ĉirkaŭaj homoj estis laŭeble ĝuantaj la kareson de beleco kaj strebantaj al bela spirita medio. Kaj ŝi, eble estis serĉanta la ĝojon en la pasintaj tagoj aŭ sentojn jam paralizigintajn? Ŝi mem ne sciis.

Ŝi apatie trenis sin sur la strato kaj tute ne rimarkis, ke verda aŭto estas kuranta al ŝi. La ŝoforo hupis por atentigi ŝin. Sed ŝi montris nenian reagon. Kiam la aŭto proksimiĝis, ŝi eĉ haltis, tute senmove, kvazaŭ ŝi dezirus, ke la aŭto surruliĝu sur ŝian se-

nilan korpon kaj portu ŝian animon al la alia mondo, kie estas ŝiaj filo kaj edzo.

Eksonis kolera kaj agaca bruo estigita de forta bremsa kaj abrupta ĝiro, kaj tuj poste sekvis terura bruo de kolizio — la aŭto peze puŝeĝis kontraŭ granda arbo apud ŝi, kio deskuis multe da purpuraj florgrapoloj. En palpebrumo ŝi estis vekita kaj tuj terurita.

Homoj alkuris kaj ŝi estis prempuŝita ĝis la rompitaĵoj de la aŭto.

“Ho,” en sia akuta kriego ŝi abrupte kliniĝis super la stirejon kaj vidis vizaĝon kun fluanta sango kaj plie, sur la paliĝanta vizaĝo ŝi vidis cikatrojn de gratvundo — ŝi rekonis, ke la cikatroj estiĝis de ŝia gratado.

“Ho, ĉielo, vi redonu la filon, vi redonu!” ŝi kriegis en la koro, ploregis, larmis. Ŝi sentis, ke la vizaĝo, la fluanta sango, la arboj kaj floroj, ĉiuj rapide turniĝadis, kaj en tiu vertiĝdona turniĝado ŝi vekigiĝis, aŭ tiel diri, ke ŝi rekonsciigiĝis.

Fine la sanganta ŝoforo estis portita en blankan pordon kun ruĝa kruco, helpate de multaj preterpasantoj. . .

. . . Pasis kelkaj horoj. Ŝi iradis, atendis kaj benis en la koridoro de la hospitalo, en granda maltrankviliĝo kaj doloro. . .

“Via sangogrupo estis konstatita; kiel hazarde, ke la via estas sama al la lia!”

“Do savu lin per mia sango, per la mia!”

“Estu kvietaj — kiu estas li por vi?”

“Li. . . filo. . . mia filo. . .”

Esperantigis Ŭang Ŝijong

Instruisto Mi*

Antaŭ nelonge mi veturis per trajno al Ŝidu ĉe la sudokcidenta limo de Pekino. Kaj de tie piedirinte 7.5 kilometrojn laŭ la rivero Ĝjuma, mi atingis la Centran Elementan Lernejon de Liŭdu — la cellokon de mia vojaĝo. Mi venis por intervjui ordinaran vilaĝan instruiston Mi Ŭenĉing.

Bedaŭrinde, instruisto Mi forstis pro kunveno en la gubernia urbo kaj estis revenonta vespere. Mi venis al lia hejmo. Lia edzino Ŭej Ŝuhŭa varme akceptis min. Ili loĝas en nova tegolita domo el du ĉambroj, kun plankareo de ĉ. 30 kvadrataj metroj. La ĉambroj estas meblitaj preskaŭ same kiel en urbo. Ŭej Ŝuhŭa, kun malgrasa vizaĝo kaj mallonga hararo, portis simplajn, bone sidantajn vestojn. Ŝi diris al mi, ke ŝi estas indiĝeno kaj laboras en la subdistrikta virina federacio.

“Kiel vi interkonatiĝis kaj fariĝis geedza paro?” mi demandis rekte.

“Ni geedziĝis sen helpo de svatanto,” ŝi respondis iom honeste. “La afero tute ordinara. Mia edzo estas pli aĝa ol mi je kvin jaroj. Li venis de Pekino al Liŭdu en la aĝo de 17 jaroj, kiam mi vizitis elementan lernejon. Fininte la studon en mezlernejo, mi ekinstruis portempe en

la elementa lernejo. Mi laboris kune kun li pli ol unu jaron, kaj tiel ni bone konis unu la alian. Mi trovis, ke li estas honesta kaj

vivas modeste, ne kiel iuj urbanoj, kiuj turnas sian atenton al manĝado kaj vestado. Printempe de 1970 ni geedziĝis. Nia tuta




Instruisto Mi preparas lecionojn.

havaĵo konsistis nur el litaĵoj kaj termosoj. En tiuj jaroj ni devis pruntepreni loĝdomon. En 1983 ni fiksloĝis en tiu ĉi domo. Por povi labori kun plena energio, mia edzo loĝigis niajn du infanojn en Pekino unu post la alia.” Nia interparolado daŭris ĝis tagmezo.

Post la tagmezo mi renkontis estron Ŭej de la Centra Elementa Lernejo. Ni komencis nian inter-

parolon per eduko disvolviĝanta en la montregiono.

Li rakontis: “Liŭdu-subdistrikto havas ĉ. 2 700 loĝantojn. En la komenca periodo de la 50-aj jaroj ĉi tie estis neniu diplomito de mezlernejo. El la lernaĝaj infanoj nur 20% havis okazon viziti elementan lernejon. En 1955 la procentaĵo de popularigo de elementa eduko atingis nur 40%. En 1963 Mi Ŭenĉing



Instrukisto Mi donas meteologiajn sciojn.

venis al Liŭdu, kie li dediĉis al la montregiona edukado 23 jarojn kune kun aliaj instruistoj. Nun la subdistrikto jam havas kvin elementajn lernejojn kaj unu mezlernejon. En la lastaj jaroj ĉiuj lokaj lernaĝaj infanoj povis viziti la Centran Elementan Lernejon kaj ĉiuj ĝiaj diplomitoj povis fariĝi mezlernejanoj, el kiuj iuj eĉ sukcesis eniri en superajn lernejojn.”

Li daŭrigis: “En nia regiono la vivo estis malfacila kaj la kulturo postĝinta, kio kaŭzis grandan malfacilon por popularigi edukadon. Multaj kamparanoj ne povis aŭ ne volis sendi siajn infanojn al lernejo; iuj infanoj forlasis lernejojn, ankoraŭ ne fininte sian lernadon. Instrukisto Mi devis mobilizi al daŭra lernado tiujn, kiuj jam ĉesis lerni, kaj persvadi tiujn, kiuj intencis ĉesi lerni. Li ofte sin okupis pri vizitado al la familioj de siaj lernantoj.”

Lernejestro Ŭej diris al mi ankaŭ, ke instrukisto Mi ĉiam serioze traktas la instruadon. Liaj lernantoj diris, ke li bone donis lecionojn de matematiko. Li laŭeble faris la lecionojn facile

kompreneblaj, viglaj kaj interesaj por larĝigi la horizonton kaj levi la komprenpovon de la lernantoj. Foje, en leciono pri matematiko li komencis klarigi frakcion per la demando: “Kion vi manĝis matene?” Aŭdinte tion, la lernantoj iom surpriziĝis kaj post momento tuj vigliĝis. Ili respondis konkure.

“Mi manĝis vaporumitan farunaĵon.”

“Mi manĝis patkukon.”

“Mi manĝis. . .”

“Ĉu vi povas manĝi tutan patkukon?” daŭrigis instruisto Mi.

“Ne.”

“Nur duonon.”

“Pli ol duonon.”

“Kiel esprimi ĝin per frakcio?”

Tiamaniere instruisto Mi prezentis koncepton pri frakcio kaj faris konkludon poste, por ke la lernantoj komprenu kaj digestu la klarigaĵon. Li penis, ke en ĉiu leciono la lernantoj posedu kion li instruis. Nun instruisto Mi jam fariĝis vicestro de la Centra Elementa Lernejo, respondecante pri la instruado de ĉiuj lernejoj de la subdistrikto. Lia ŝarĝo fariĝis pli peza.

Post vespermanĝo mi vidis Mi ĵus revenintan. Li, malaltstatura kaj maldika, parolis per sonora voĉo. Li estas malkaŝema.

“Kiel vi venis ĉi tien?” mi demandis.

“Diplomite de normala lernejo, mi kun pacienco persvadis mian patrinon, kiu volis restigi min ĉe si, kaj venis ĉi tien laŭ la aranĝo de la lernejo.”

Instrukisto Mi (la dua de maldekstre) donas lecionon.



“Vi certe multe suferis dum la 23-jara vivo en la montregiono!”

“Jes, en la unuaj jaroj post mia alveno ĉi tie ne estis elektra lampo, kaj mi devis prepari lecionojn sub kerosenolampo. La klasĉambro el ŝtonoj estis malgranda kaj malluma, kun fenestroj kaj pordo sen vitro. Tia estis ankaŭ la oficejo servanta samtempe kiel dormoĉambro. En la tuta jaro ni povis ricevi nur malmulte da legomoj.”

Tie la trafiko estis ege malfacila. Oni devis piediri dekojn da kilometroj da vojo kaj transpasi kelkajn pontetojn por preni aŭton. Kiam Ĝjuma-rivero inundis, ĉiuj pontetoj malkonstruiĝis kaj Liŭdu fariĝis kvazaŭ izolita insulo. Pro tio instruisto Mi malofte iris al la urbo. Foje jam vesperiĝis, kiam li elaŭtiĝis, reveninte de Pekino al la lernejo. Por ne prokrasti la lecionojn de la sekvanta tago, li daŭrigis sian vojon kun murmuranta stomako, tranoktis sur monto kaj atingis la lernejon frumatene.

Instruisto Mi diris al mi, ke Liŭdu-subdistrikto estas ĉirkaŭita de montoj kun perimetro de ĉ. 50 kilometroj, kvazaŭ ĝi kuŝus sur la fundo de granda kaldrono. La elementaj lernejoj lokiĝas disse, iuj eĉ sur monto. En 1969 li sola instruis en iu elementa lernejo 12.5 kilometrojn for de la Centra Elementa Lernejo. Li instruis dek malsamajn studobjektojn al pli ol dudek lernantoj de kvar klasoj. Li devis mem preni akvon ĉe la monttalo por prepari manĝaĵon. En 1970 li transprenis la instruadon en alia elementa lernejo. Iu valetto kun malordaj ŝtonoj servis kiel vojo kondukanta al la lernejo, kaj videblis neniun domon en spaco de 10 kilometroj. En tiu valo li iris sep jarojn. Eĉ la tablojn, seĝojn,

lernolibrojn kaj orgenon li kaj liaj lernantoj mem portis al la monto.

“Nun ĉio boniĝis.” ju pli parolis instruisto Mi, des pli li vigliĝis. “En la 70-aj jaroj ĉi tien atingis elektro kaj fervojo trapasis Ŝidu, unuapaŝe solviĝis la trafika malfacilo. En tiuj jaroj mi instruis pli ol 400 lernantojn, nemalmultaj el ili fariĝis instruistoj.”

“Vi havas lernantojn ĉie en la subdistrikto. Ĉu vi ne intencas labori en Pekino?” demandis mi.

“Antaŭe pli ol dek pekinaj instruistoj kune kun mi venis al la montregiono, nun restas nur mi. Laŭ miaj konkretaj kondiĉoj ankaŭ mi povas reveni al Pekino, sed verdire, mi jam kutimiĝis al la vivo en la montregiono. Pasintec ĉi tie la vivo estis tre malfacila, kaj nun jam multe pliboniĝis. Nia lernejo donis domon al mi. En Pekino ordinara instruistoj kiel mi eble ne havas tiel bonan loĝdomon. Ankaŭ mia salajro estas pli alta ol tiu de instruistoj laborantaj en la urbo. Estas menciinde, ke la registaro donis al mi grandan honoron. Ekde 1977 mi multfoje estis elektita kiel avangarda eduka laboranto kaj labormodelo.

“Kion vi esperas?” demandis mi.

“Estus pli bone, se la Centra Elementa Lernejo havus aŭton.” Li ankoraŭ zorgis pri la lernejo.

Reveninte de la intervjuo, mi pensis: La montregionoj de Ĉinio konsistigas du trionojn de ĝia totala areo. Ilia kulturo estas postiĝinta. Mi esperas, ke aperos dekmiloj da instruistoj kiel Mi.

* *Tiu ĉi artikolo estas en facila lingvo.*

KURANTAJ AFEROJ

LA PLASTA PRODUKTO-KVANTO DE ĈINIO OKUPAS LA SEPAN LOKON DE LA MONDO

Rapide disvolviĝas la plasta industrio de Ĉinio, kies jara produktokvanto atingis 2 350 000 tunojn kaj okupas la sepan lokon en la mondo, ĝia produktovalor superis dek miliardojn da jŭanoj. Tial ĝi jam fariĝis grava nova industrio de Ĉinio.

En la pasintaj 5 jaroj la produktokvanto de la plastaĵoj de Ĉinio duobliĝis. La produkta kaj venda kvanto de poragrikultura plasta membrano, teksitaj plastaj sakoj kaj plastaj ŝuoj okupas la unuan lokon en la mondo. Plasto estas aplikata ne nur en produktado de la ĉiutagaj bezonaĵoj, sed ankaŭ en pakado de industriaĵoj, agrikultura produktado, domdekoracio, produktado de novspecaj konstruaj materialoj, kaj ludas gravan rolon en la ekonomia kaj socia vivo.

LA UNUA KARBOLIKVA FABRIKO DE ĈINIO EN FUNKCIADO

Lastatempe la unua karbolikva fabriko de Ĉinio ekfunkciis en Fuŝun. Karbolikvo, surrogato de mazuto, estas nova industria hejtaĵo. Ĝia hejta rilatumo estas 30% pli alta ol tiu de ordinara karbo. Dank' al uzo de la nova tekniko ekspluatita de la karbolikvo-produkta grupo sub la Fuŝun-a Minerala Buroo, la karbolikvo servas ne nur kiel surrogato de mazuto, sed eĉ malaltigas la produktokoston kaj ne polucias la medion. La fabriko ĉiujare produktas 50 000 tunojn da karbolikvo kaj estas unu el la malmultaj samspecaj fabrikoj en la mondo.

10 RARAJ FIŝSPECIOJ TROVITAJ EN LA FLAVA RIVERO

Ĉinaj sciencistoj trovis dek rarajn speciojn de fiŝoj en sia unua

esplorado ĉe la fontoj de la Flava Rivero.

En la esplorado oni trovis novan specion de fiŝo, kies buŝo estas aparte mallonga kaj dika kaj kies korpo kaj tentakloj surhavas multajn vezikformajn nodetojn. La sciencistoj faras plian esploron pri ĝi.

GRANDA EKSPozICIO DE LIBROJ EN PEKINO

Ĉe la fino de aprilo kaj la komenco de majo la plej granda ekspozicio de libroj okazis en Pekino. Pli ol 500 eldonejoj eksponis 35 000 specojn de libroj. Inter ili pliparto estis en la ĉina lingvo kaj aliaj en la lingvoj de la ĉinaj nacimajplimulto, kiaj la mongola, tibeta, ujugura, kazaha, korea k.a. En la ekspozicio estis ankaŭ libroj en la lingvoj angla, franca, germana, japana, rusa, hispana, araba kaj en Esperanto. Krome estis ankaŭ sonlegajoj, libroj eldonitaj en Hongkong, libroj kaj periodaĵoj eldonitaj de Ĉinio kaj aliaj landoj aŭ Hongkong. La ekspozicio akceptis ĉ. 300 000 vizitantojn kaj vendis 7 600 000 ekzemplerojn.

SAMARANCH DONIS ORDENOJN AL ĈINOJ

Je la 28-a de aprilo ĉi-jare prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato J. A. Samaranch donis oran olimpikan ordenon al Ŭan Li, vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio, arĝentan olimpikan ordenon al Hŭang Ĝong, vicprezidanto de la Ĉina Olimpika Komitato, kaj olimpikan pokalon al la Ĉina Olimpika Komitato.

La Internacia Olimpika Komitato komencis doni olimpikajn ordenojn en 1975. Vicĉefministro Ŭan Li estas la 15-a gajninto de la ora ordeno. Pli ol 150 personoj en la mondo ricevis la arĝentan ordenon. Jong Gaŭtang, estro de la ĉinaj sportaj rondoj en 1983, kaj Ĝong Ŝitong, prezidanto de la Ĉina Olimpika Komitato en 1984,

S-ro J.A. Samaranch (maldekstre) donis al s-ro Ŭan Li oran olimpikan ordenon.



ricevis arĝentan olimpikan ordenon respektive.

LA 11-A AZIA SPORTKUNVENO OKAZOS EN PEKINO

La unua sesio de la Organiza Komisiono de la 11-a Azia Sportkunveno okazigita en aprilo ĉi-jare decidis: La 11-a Azia Sportkunveno okazos en Pekino en septembro kaj oktobro de 1990.

Okaze de la azia sportkunveno, oni konstruos 15 stadionojn kaj sportohalojn en Pekino kaj reformos la nunajn 11 stadionojn kaj sportohalojn. Samtempe oni provizos ilin per sportistaj vilaĝoj kaj aliaj instalaĵoj.

MARATONA STAFETKONKURSO INTER ĈINAJ KAJ JAPANAJ SPORTISTOJ

Posttagmeze de la 20-a de aprilo okazis amika maratona stafetkonkurso inter ĉinaj kaj japanaj sportistoj ĉe la piedo de la Granda Muro, Pekino.

Estis la unua fojo por Ĉinio okazigi maratonan stafetkuradon. Centoj da sportistoj el dek ĉinaj

kaj sep japanaj stafetaj grupoj partoprenis en la amika maratona stafetkurado de la amikaj urboj Pekino kaj Tokio ĉe la Granda Muro, en la maratona stafetkurado de la "Ĉina kaj Japana Amikeco" ĉe la Granda Muro kaj en la kampa kurado de la Mutjanju-a Granda Muro.

RICK HANSEN EN ĈINIO

29-jara kanada atleto Rick Hansen, la unua vojaĝanto per rulseĝo veturanta tra la mondo, atingis Pekinon per aviadilo la 11-an de aprilo kaj komencis sian vojaĝon en Ĉinio.

Hansen perdis siajn kruojn en la aĝo de 15 jaroj pro trafika akcidento, sed li pene sin ekzercis en sportado kaj fariĝis la unua kripla diplomito de la fizikkultura fakultato de la Brita Kolumbia Universitato. La 21-an de marto, 1985 li komencis de Vankuvero, Kanado, sian vojaĝon per rulseĝo tra la mondo. Per tio li celis inspiri la tutmondan popolon koni la latentan kapablon de la kripluloj kaj kolekti monhelpon por kripluloj tra la mondo.

Jen komenciĝas konkurso de ĉinaj kaj japanaj sportistoj pri la kampa kurado de la Mutjanju-a Granda Muro.



Antaŭ alveno al Ĉinio li travojaĝis pli ol 20 landojn kaj regionojn de Ameriko, Eŭropo, Afriko kaj Azio kaj estis respektata kaj subtenata de diverslandaj registaroj kaj popoloj. Li baldaŭ realigos la celon kolekti 40 000 000 usonajn dolarojn per vojaĝo. Li faros vojaĝon de 48 000 km en Ĉinio.

LA MEDITERANEA KLUBO DE FRANCO STARIGOS FERIPASIGAN VILAĜON EN PEKINO

La Mediteranea Klubo de Francio, internacie fama turisma kompanio, starigis pli ol 110 turismajn vilaĝojn en diversaj lokoj de la mondo. Marte, ĉijare la kompanio kontraktis kun Ĉinio pri starigo de la feri-pasiga vilaĝo — la hotelo Nanhu, kiu situos en la Somera Palaco, la imperiestra ĝardeno de Ĉing-dinastio. Ĝi kiel klasika ĉina konstruaĵo sin trovas apud monto ĉe la lago, kun zigzaga koridoro en kvieta kaj ĉarma medio. La domdekoracio, manĝaĵo kaj servo estos ĉinstilaj. Ĝi organizos turistan grupon de alilandanoj al Ĉinio kaj donos raporton, kurson kaj prezentadon pri la historio, kulturo kaj moroj de Ĉinio. La kompanio planas starigi tiajn vilaĝojn en aliaj turismaj lokoj de Ĉinio.

ĈINA BALETA TRUPO EN USONO

En marto kaj majo ĉi-jare la Centra Baleta Trupo de Ĉinio faris 47 prezentojn en 11 usonaj urboj, kiu daŭris 62 tagojn.

La baleta trupo estis varme aplaŭdita de usonaj spektantoj pro siaj bela dancado, lerta ludarto, originala stilo kaj kombino de la okcidenta klasika baletto kun ĉina popola danco. Precipe la baletoj "Benopeta Ofero", adaptaĵo de la samtitola novelo de la granda ĉina verkisto Lusin, kaj "Ljang Ŝanbo kaj Ĝu Jingtaj" kun enhavo pri amo en la antikva Ĉinio donis novan artan ĝuon al usonaj spektan-

M. Mathieu prezentas en Pekino.



toj, kiuj ofte aprecas prezentadon de mondfamaj baletistoj.

FRANCA KANTISTINO MIREILLE MATHIEU EN ĈINIO

Franca kantistino M. Mathieu kaj ŝiaj 34 kolegoj faris turneon en Ĉinio de la 26-a de aprilo ĝis la 9-a de majo.

Ŝi ĝuas reputacion en la mondo. En la turneo ŝi prezentis por ĉinaj aŭskultantoj popularajn kaj malsam-stilajn kantojn furorajn en Francio kaj aliaj okcidentaj landoj. Tio tre plaĉis al la aŭskultantoj. Ŝi ankaŭ benefice prezentis por la Ĉina Handikapula Bonstatiga Fonduso.

LA USONA NACIA TEATRO DE SURDULOJ EN ĈINIO

Invitite de la Ĉina Dramista Asocio, maje ĉijare la nomita teatro faris turneon en Pekino, Kantonjo, Hangĝoŭ, Nankino kaj Ŝanhajo.

La teatro ĝuas altan reputacion en Usono kaj havas grandan influon ankaŭ internacie. La teatro helpis Brition, Francion, Svedion, Aŭstralion kaj Japanion fondi similan teatron. Ĝi mempage venis al Ĉinio por akceli artan aferon de ĉinaj surduloj.

Ĉi-foje ĝi prezentis la teatraĵon "En Bosko", adaptaĵon de la samtitola novelo de japana verkisto Akutugaŭa Rjunosuke, la humuran mimon "Adiaŭ, Mia Bela", kiu temas pri aŭto-T en la dudekaj jaroj, kaj usonajn fablojn.

ĈINAJ SPORTISTOJ GAJNIS LA POKALOJN THOMAS KAJ UBER

Maje la ĉinaj vira kaj virina volanaj teamoj gajnis du orajn pokalojn, venkinte la indoneziajn viran kaj virinan teamojn per 3:2 en la konkursoj de la 11-a Uber-pokalo kaj la 14-a Thomas-pokalo.

Je la 3-a de majo tri ĉinaj volanistinoj venkis siajn rivalojn respektive per 2:0 en la unuopa ludo, sed ĝiaj du duopaj ludantoj perdis la ludon. Je la 4-a de majo la ĉina vira volana teamo venkis la indonezian teamon post 5-hora ludado.

ĈINIO GAJNIS INTERNACIAN PREMION DE 37 INVENTOJ

En la 14-a Geneva Internacia Ekspozicio de Inventoj kaj Novaj Teknikoj okazigita aprile ĉi-jare, 37 el la 44 eksponitaj inventoj de Ĉinio gajnis inventan premion. Interalie la "teknologio de orobros-tegado sen cianido" inventita de Ljang Ŝjudong gajnis la "inventan premion de disvolviĝantaj landoj" de la Monda Intelekta Proprieta Organizo kaj oran medalon de la ekspozicio, la "mikrotemperatura PN-sensilo kun alta sensemo" provfarita de Ĝang Kajŝjun gajnis la "premion de la kantono Ĝenevo" kaj oran medalon.

La ekspozicio havas unu grandan premion, 20 fakajn premiojn kaj ĉ. 200 medalojn. Ĝin partoprenis 20 landoj kaj regionoj, kiuj eksponis proksimume 1 000 novajn inventojn kaj teknikojn pri produktado kaj vivo.

Ĉinio ĝin partoprenis duafoje.

Vivo de ordinaruloj

de LANGĜJE

Mi nomiĝas Langĝje kaj aĝas 33 jarojn. Mi laboras kiel ĵurnalisto de la Ŝinhŭa-a Novaĵ-agentejo en ĝia Tibeta filio. Mi naskiĝis en ordinara kamparana familio de Tibeto kaj longtempe laboris en bazaj organizoj. Mi bone scias la vivon de ordinaraj tibetanoj, por ne paroli pri la pasinteco kaj nuntempo de mia familio kun meza vivnivelo.

Mia hejmloko, nomata Lamuvilaĝo, estas pli ol 50 km. oriente de Lhasa, apud Siĉŭan-Tibetŝoseo. Ekster la vilaĝo, apud la ŝoseo kreskas altaj popoloj kaj en la vilaĝo staris budhisma templo, kiu detruigiĝis en la "Kultura Revolucio". Nun restas nur ĝia preĝejo kun freskoj.

La vilaĝo estis bieno de iu nobelo de Lhasa. Tie vivis centoj da familioj de servutuloj, inkl. miajn gepatrojn. Mi ne spertis tian vivon. Mi sciiĝis de mia patrino, ke nia familio tiam vivis mizere. Nemalmultaj familioj bankrotis pro uzuro kaj fuĝis aliloken. En 1959, kiam mi estis 6-jara, Tibeto estis demokratie reformita. Ĉiuj agroj de feŭduloj estis distribuitaj al la servutuloj. Same kiel en la aliaj lokoj de Tibeto, la servutuloj de nia vilaĝo fariĝis mastroj de la nova vivo.

Estis ne facile rekonstrui hejmlokon sur la ruino postlasita

de la servuta sistemo. Tamen estis longa sopiro por la tibetaj ordinaruloj vivi sen ekspluatado kaj subpremado kaj ĝui sian laborfrukton. Tial estis nenio plendinda fari pli da laboro por plibonigi la vivon. Mi prenu mian familion kiel ekzemplon. Tuj ĉe kokeriko mia patrino la unua ellitiĝis. Ŝi hejtis fornon per branĉaĵoj kaj bovfekaĵoj por prepari teon. Poste ŝi verŝis la boligitan teon en lignan sitelon, aldonis al ĝi buteron kaj miksis ilin kirlante. Jen estis preta buterteo ĉiumatene trinkata de tibetanoj. Tiam la tuta familio sidiĝis ĉe tableto kaj trinkis buterteon, manĝante *zanba-on**. Post matenmanĝo la patro kaj la pliĝa fratino iris labori en la kampo, la plejaĝa frato sur monton por kolekti brulaĵon, kaj la pliĝa frato kaj mi al la vilaĝa elementa lernejo.

Poste la patro mortis kaj miaj fratino kaj plejaĝa frato edz(in)iĝis kaj ekhavis sian propran familion. Kaj mia patrino devis preni sur sin la tutan mastrumadon. Malgraŭ tio ŝi kiel antaŭe subtenis nian lernadon. Diplomiĝinte, la pliĝa frato eklaboris en sia lernejo kiel instruisto kaj mi komencis lerni en mezlernejo. Poste mi studis tri jarojn en la Centra Nacimalplimulta Instituto de Pekino.

Nun mi jam havas feliĉan familion kaj bonan laborpostenon. Post laborhoroj mi ofte aŭtobuse veturas al mia hejmloko. Ĉiufoje mi povas trovi ian novan ŝanĝiĝon en la familio de mia patrino. Anstataŭ mia patrino, mia pliĝa bofratino zorgas pri la dommastrumado. Mia patrino vartas du nepinojn. En mia infaneco mia familio loĝis en du terkabanoj, el kiuj unu por dormo kaj la alia por kuirado, kaj en la korto brediĝis du bovoj. Nun ili posedas kvar novajn ĉambrojn, du por dormo, la aliaj du estas uzataj kiel tenejo kaj kuirejo. Ili bredas bovojn, ŝafojn, azenojn, porkojn kaj kokojn kaj havas en sia tenejo stakon de sakoj da tritiko kaj hordeo sufiĉan por dujara konsumado. Krom *zanba-o*, ili manĝas ankaŭ napojn kun bovaĵo aŭ ŝafaĵo kaj stufitajn terpomojn kun legomoj kaj trinkas hordean vinon. Maljunuloj kaj infanoj ofte trinkas lakton kaj manĝas ovojn. Antaŭe la litaĵoj kaj vestoj de tibetanoj estis tre simplaj, sed nun molaj vataj litkovriloj anstataŭis la pezajn kaj malmolajn tibetajn litkovrilojn.

Vere okazis granda ŝanĝiĝo en la vivo. Kamparanaj familioj disponas radioricevilon kaj horloĝon kiujn antaŭe oni rigardis kiel luksaĵojn. Iuj riĉaj kampa-



Al urbo

ranoj eĉ posedas traktoron kun valoro de pli ol 30 000 jŭanoj.

Mia patrino 75-jara estas pia budhano. Sed en sia juneco, pro tro multa laboro ŝi ne havis tempon por partopreni en religia aktivado. Nun ŝi havas sufiĉan tempon por reciti sutron kaj fari preĝadon. En ĉiu religia festo ŝi pilgrimas al Lhasa. Mi deziras, ke ŝi pasigu siajn lastajn jarojn en Lhasa. Sed tera odoro kaj bruta kriadado pli allogas ŝin. Kaj plie, ŝi estas zorgeme flegata de mia pliĝa frato kaj lia edzino. Mi estas trankvila pri tio.

Mia pliĝa frato estas instruisto de elementa lernejo kun 20 laborjaroj. Li instruas la tibetan lingvon. Li bone plenumas sian oficon kaj ĉiujare iuj el liaj

instruitoj eniras la guberniurban mezlernejon post ekzameno. Tial ĉiuj vilaĝanoj lin estimas. La bofratino estas analfabeto, sed ŝi estas lerta dommastrino. Krom preparado de manĝo, lavado de vestoj, ŝpinado k. a., ŝi bone faras ankaŭ kampajn laborojn. Dum libertempo donita al la lernantoj en aferplenaj sezonoj de agrikulturo mia frato helpas sian edzinon en kampaj laboroj. En Tibeto oni praktikas la politikon "Agroj je dispono de kamparanaj familioj". La kamparana familio havas plenan rajton disponi siajn rikoltaĵojn. En la pasinta jaro la familio de mia frato akiris bonan rikolton kaj enspezis pli ol 600 jŭanojn per vendo de superflua greno. Kaj cetere, ili enspezas rimarkinde multe per vendo de brutoj kaj

mia pliĝa frato ricevas pro instruisteco subvencion de 15 jŭanoj ĉiumonate. Tiu lia sumo da mono estas uzata ĉefe por aĉeti teon, bombonojn, salon k.a. kiujn ili ne povas mem fari. Ili produktas viandon, buteron kaj lanojn sufiĉajn por sia bezono.

Kiam mi estis infano, mia familio konatiĝis kun iu en Lhasa. Ĉiufoje, kiam ni estis en Lhasa por ia afero, ni pasloĝis ĉe li. Post kiam mi akiris oficon kaj fikse enloĝiĝis en Lhasa, nia kontaktiĝo fariĝis pli ofta.

Tio estas kvinmembra familio. La mastro Ŭangĝiŭ estas kuiristo de la Lhasa-a Aŭto-riparejo kaj lia edzino Basang mas-trumas hejme. Ili havas tri gefilojn. La filino laboras en ma-

ŝin-riparejo. Unu filo instruas en mezlernejo kaj la alia lernas en supera mezlernejo. Ĉiunonate ili enspezas ĉ. 600 ĵuanojn. La domo estas provizita per televidilo, magnetofono, altklasa ŝranko, tapiŝo k.s. Ili vivas sufiĉe bone kompare kun la vivo de aliaj loĝantoj de Lhasa.

La Lhasa-anoj ŝatas ekskursi kaj pikniki en arbaro kaj parko plena de arboj. Ankaŭ la familio de Ŭangĝiŭ ŝatas tion. Preskaŭ ĉiujn feriojn kaj festojn, krom en vintro, la familio pasigas en parko aŭ arbaro. Se mi

havas ŝanĉon renkontiĝi kun ili en tia tempo, mi ĉiam partoprenas en ilia ĝojo. La Popola Parko Norpu, antaŭe la somera palaco de Dalaj-lamao, estas ilia frekventata loko. Tie kreskas antikvaj arboj ĉielskrapantaj, sterniĝas verd tapiŝo de herboj kaj ore brilas imponaj konstruaĵoj. Ĉiufoje ili starigas en verda ombro blankan tendon ruĝe garnitan. La tuta familio sidas ĉirkaŭ la tableto plenkovrita de hordea vino, buterteo kaj diversaj manĝaĵoj, dum magnetofono plezurigas per bela tibe-

ta popola kanto. Se mi eniras en ilian tendon en tiu tempo, la gastama Ŭangĝiŭ laŭ tibeta kutimo regalas min per bombonoj kaj plentaso da hordea vino. Kiam mi trinkas la unuan plentason da vino, li tuj plenigas la tason. Kaj tion ni ripetas trifoje. Poste mi devas eltrinki la vinon per unu tiro. Jen tibeta ceremonio por akcepti gastojn. Kompreneble, la konatoj ne bezonas sin ĝeni per la ceremonio kaj povas kondukti familiare.

Krom trinki vinon kaj ĝui bongustan manĝaĵon, mi kaj la pliaĝa filo de Ŭangĝiŭ ofte ludas bilardeton. Tiu, kiu malvenkas en la ludo, estas punita per trinko de taso da hordea vino. Mi estas plej ofte punata, ĉar li ludas pli lerte ol mi.

La geedzoj Ŭangĝiŭ kredas je lamaismo kaj recitas sutron eĉ en ferioj kaj festoj. Post pikniko murmurante sutron kaj nombrante rozarion, ili faras rondiradon ĉirkaŭ la domoj antaŭe loĝataj de Dalaj-lamao. Ordinare, ĉu ventas ĉu pluvas, ĉiumatene kaj ĉiuvespere ili faras rondiradon ĉirkaŭ la templo Daĝaŭ aŭ Potala-palaco recitante sutron. Tio estas nemankigebla por ilia vivo.

En la lastaj jaroj nova perspektivo aperis en ekonomio kaj la popola vivo. Rimarkinde plialtiĝis la enspezo de la popolo kaj okazis granda ŝanĝiĝo en la formo kaj kvalito de la vivo. Kompare al la vivnivelo de evoluintaj provincoj de Ĉinio, tiu de Tibeto estas malalta, des malpli al tiu de la evoluintaj landoj. Tamen la vivo de tibetanoj ja eniris en la novan etapon kaj havas inspiran perspektivon.

** Zanba-o estas ĉefa manĝaĵo de tibetanoj, en formo de buleto, farita el faruno de rostita hordeo kaj buterteo.*

Preparado de butero





Ĝuado de tibeta teatraĵo


Juna patrino kaj ŝia infano





Venkintoj de ĉeval-konkurso

Fotografo-amatoro




Ĉe riverbordo






Levo de silka rubando

Geknaboj sur stepo



Fiŝista insuleto



EL REALA VIVO DE ĈINIO

VIVO DE FIŜISTOJ

Fotoj de ŜEN ĈEN

Tirado de fiŝreto



Matene, kiam maro brilis de la suno, mi venis al fiŝhaveno en Fuĝjan-provinco kaj suriris ŝipon — fiŝistan hejmon. La fiŝistoj ĝoje akceptis min en la kajuto kun simplaj dormotabuloj kaj litaĵoj kaj malgrandaj bovloj.

Antaŭ ol eliri al maro, la fiŝistoj kutime trinkas bovlon da vino. Poste ili direktas la ŝipon

al la mara regiono abunda je fiŝoj kaj rapide ĵetas reton murmurante fiŝistan kanton.

Mi trovis ankaŭ, ke sur la plaĝo maljunuloj kaj infanoj kun korbo kolektas konkojn kaj kaptas malgrandajn fiŝojn kaj salikokojn. La fiŝistoj nomas tion rikolteto.

Tagmeze oni preparas manĝon surŝipe kaj de tempo al tempo disportiĝas bonodoro de fiŝpladoj. La infanoj ludas sur la plaĝo kaj virinoj trikas kaj riparas fiŝretojn.


Mi revenis en la urbon kaj vidis prosperan fiŝbazon, kiu vekis ĉe mi belan rememoron pri la vizito.

Fiŝbazo



Riparado de fiŝreto






Fiŝistaj infanoj


Tagmanĝo ĉe maro





Piŝista familio

Ili trinkas vinon antaŭ ol eliri al maro.



Rikolteto

Patro kaj filo



La teritorio kaj loĝantaro de Ĉinio

de LAN ŜAN

Ĉinio, situanta en la orienta parto de Azio kaj ĉe la okcidenta bordo de Pacifiko, estas lando kun vasta teritorio kaj abundaj riĉfontoj. Ĝi havas areon de 9 600 000 kvadrataj kilometroj. Ĝia mara regiono estas vastega. Ĝia plej norda fino estas la centra linio de la ĉefa akvovojo en Hejlong-rivero kaj ĝia plej suda fino — Zengmu-rifo de Nanŝa-insularo, kun distanco de pli ol 5 500 kilometroj inter si tra proksimume 50 gradoj da latitudoj. Ĝia plej orienta fino estas la kunfluejo de la riveroj Hejlong kaj Usuli kaj ĝia plej okcidenta fino — Pamiro, kun distanco de 5 000 kilometroj inter si tra pli ol 60 gradoj da longitudoj.

Ĉinio limtuŝas Koreion, Mongolion, Sovetunion, Afganion, Pakistanon, Hindion, Nepalon,

Sikimon, Bhutanon, Birmon, Laoson kaj Vjetnamion. Oriente kaj sudoriente de Ĉinio estas maroj, trans kiuj kuŝas Japanio, Filipinoj, Brunejo, Malajzio kaj Indonezio.

La marborda linio de Ĉinio, kun totala longeco de pli ol 18 000 kilometroj, komenciĝas de la enfluejo de Jalu-rivero ĉe la ĉina-korea landlimo en nordo kaj finiĝas ĉe la enfluejo de Bejlun-rivero ĉe la ĉina-vjetnama landlimo en sudo. Al la ĉina kontinento najbaras Bohaj-mar, la Flava Maro, la Orienta Ĉina Maro kaj la Suda Ĉina Maro. Kaj Bohaj-mar brakumita de la duoninsuloj Ljaŭdong kaj Ŝandong estas interna maro de Ĉinio. La vastaj kontinentaj bretoj apudmaraj riĉas je petrolo kaj natura gaso.

En la ĉinaj maroj dissemiĝas pli ol 5 000 insuloj grandaj kaj malgrandaj, el kiuj Taj'ŭan estas la plej granda, kun areo de ĉirkaŭ 36 000 kvadrataj kilometroj, kaj la dua estas Hajnan-insulo kovranta areon de pli ol 33 000 kvadrataj kilometroj. La plej orientaj ĉinaj insuloj nomiĝas Djaŭju kaj Ĉiŭej nordoriente de Taj'ŭan. Dongŝa, Ŝjiŝa, Ĝongŝa kaj Nanŝa dissemataj en la Suda Ĉina Maro estas la plej sudaj insularoj de Ĉinio.

En Ĉinio majestas altaj montaroj kaj ondas malaltaj montoj, sternaĝas vastaj fekundaj ebenaĵoj kaj kuŝas grandaj kaj malgrandaj basenoj. Rigardate de alte, la ĉina tereno similas al ŝtuparaj kampoj malleviĝantaj iom post iom de okcidento orienten. La Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo en la plej alta parto de okcidenta Ĉinio, meze 4 500 metrojn super la marnivelo, estas la plej granda kaj plej alta en la mondo kaj konata kiel "Monda Tegmento". Himalaĵo ĉe ĝia suda rando estas la plej alta montaro en la mondo. Ĝia ĉefpinto Ĉomolangma 8 848 metrojn super la marnivelo estas la plej alta en la mondo. Oriente de la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo dissemiĝas la Altebenaĵo de Interna Mongolio, la Leŭsa Altebenaĵo, La Junnan-Gujĝou-a Altebenaĵo kaj la basenoj Tarim, Ĝunggar kaj Siĉŭan, 2 000-1 000 metrojn super la marnivelo. Pli oriente sternaĝas la Nordorienta Ebenaĵo, la NordĈinia Ebenaĵo kaj la Ebenaĵo de

Diversnaciecaj popolanoj



Meza kaj Malsupra Basenoj de Jangzi-rivero, malpli ol 1 000 metrojn super la marnivelo, de nordo suden. La ebenaĵoj vaste-gaj kaj interligitaj estas gravaj regionoj por agrikulturo.


Ĉinio abundas je riveroj. Sur ĝia vasta tero fluas pli ol 50 000 riveroj ĉiu kun basen-areo de pli ol 100 kvadrataj kilometroj. El ili la plej granda estas Jangzi kun totala longeco de 6 300 kilometroj. Ĉinio havas ankaŭ aliajn grandajn riverojn, kiel la Flava Rivero, Perlo-rivero, Hejlong-rivero kaj la riveroj Lancang kaj Jarlung Zangbo. En Ĉinio troviĝas multaj kanaloj, el kiuj la plej fama estas la Granda Kanalo inter Pekino kaj Hangĝou, kun totala longeco de 1 794 kilometroj. Ĝi estas la plej longa en la mondo.

La ĉinan teritorion punktas pli ol 2 800 lagoj ĉiu kun areo de pli ol unu kvadrata kilometro. El ili 12 ĉiu superas areon de mil kvadrataj kilometroj.

Ĉinio havas grandan rezervon da mineralaj riĉfontoj sub la tero. Oni jam bone prospektoris la rezervokvantojn de 132 mineralaj specoj, inkluzive pli ol 50 specojn de metalaj mineraloj. La rezervokvantoj de volframo, antimonio, zinko, litio kaj raraj teroj okupas la unuan lokon en la mondo. La rezervokvantoj de karbo, nafto kaj natura gaso estas grandegaj. En Ĉinio ekzistas proksimume 80 specoj de nometalaj mineraloj. La rezervokvantoj de sulfofera mineralo kaj magnezito de Ĉinio okupas respektive la unuan lokon en la mondo, kaj tiu de fosfora mineralo la duan lokon. Ankaŭ la rezervokvantoj de asbesto, grafito kaj fluorito de Ĉinio okupas la unuajn lokojn en la mondo.

Ĉinio, kiu havas longan historion, estas lando kun la plej

Duĝjangjan en Siĉjŭan-provinco



granda loĝantaro en la mondo. Ĝia loĝantaro konsistigas 22.6% de tiu de la mondo. Laŭ la censo farita de Ĉinio en la 1-a de julio 1982, Ĉinio havis 1 031 882 511 loĝantojn, inkluzive 18 328 596 loĝantojn de Tajŭan-provinco kaj 5 378 627 loĝantojn de Hongkong kaj Makao.

Pro la historiaj kaj ekonomiaj kaŭzoj ne ekvilibras la loĝantara distribuo. Sur ĉiu kvadrata kilometro da ĉina tero loĝas meznombre 107 homoj, ĉe la orienta marbordo pli ol 200, en la vasta nordokcidenta regiono malpli ol 10 kaj en Gobio apenaŭ unu. En la plej dense loĝataj Jangzi-rivera Delto, Ĉengdu-ebenaĵo kaj Perlo-rivera Delto la meza loĝantara denseco de ĉiu kvadrata kilometro superis 600.

Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949 la nombro de urboj rimarkinde kreskis kun la disvolviĝo de la

nacia ekonomio. Nun en Ĉinio estas sep urboj ĉiu kun pli ol 2 000 000 loĝantoj, ok urboj ĉiu kun 1 000 000-2 000 000 loĝantoj, 30 urboj ĉiu kun 500 000-1 000 000 loĝantoj kaj pli ol 2 800 urboj kaj urbetoj ĉiu kun malpli ol 500 000 loĝantoj. Kvankam la ĉina urba loĝantaro kreskis al 206 000 000, tamen la ĉina kampara loĝantaro konsistigas ankoraŭ 80% de la totala nombro.

Ĉinio estas lando kun 56 naciecoj, el kiuj Han-nacieco havas la plej multajn membrojn kaj konsistigas 93.3% de la ĉina loĝantaro. La membroj de la grandaj naciecoj vivas en mikse loĝataj regionoj kaj tiuj de la malgrandaj en koncentre loĝataj regionoj. Ĉiuj naciecoj, ĉu kun granda, ĉu kun malgranda membraro, ĉu en vasta ĉu en malvastata regiono, egalrajte partoprenas en administrado de la ŝtataj aferoj.

La dezerto Mu Us en la Interna Mongolio



Homoj, riĉfontoj kaj medio

En la dua duono de la dudeka jarcento la ekspluatado kaj konsumado de la naturaj riĉfontoj atingis senprecedencan skalon. La media polucio fariĝis pli kaj pli serioza kaj la tuta ekologia sistemo de la mondo unufoje perdis sian ekvilibron. Tio okazis ĉefe pro tio, ke oni ne ĝustatempe ordigis la rilatojn inter homoj, riĉfontoj kaj medio, kiam draste kreskis la loĝantaro kaj rapidege disvolviĝis industrio kaj agrikulturo. La ĉiam pli serioza dezertiĝo kaj trosekegeco en Afriko kaj la acida pluvo en okcidenta Eŭropo povas esti rigardataj kiel puno de la naturo al la homaro. Oni jam bone vidis, ke nepre ne-

cesas esplori la ŝarĝpovon de la riĉfontoj en la terглоbo kaj alpreni efikajn rimedojn, alie aperos terura konsekvenco.

EPOKO DE ALTA KONSUMO DE RIĈFONTOJ

Kun la rapida disvolviĝo de industrio aperis ekscesa konsumado de tero, arbaro, energio, dolĉakvo kaj aliaj naturaj riĉfontoj, precipe la ekspluatado kaj utiligo de regenerivaj riĉfontoj, kiaj bestoj kaj vegetaĵoj, detruis ilian simplan reproduktadon. Oni kalkulis, ke nun sur la terглоbo ĉiutage unu specio de besto aŭ vegetaĵo iras al sia pereco. Biologoj opinias, ke pereco de ĉiu vegetaĵa

specio kaŭzas pereon al dek ĝis tridek specioj de bestoj, kiuj vivas de ĝi. Nun sur la terглоbo restas ĉ. kvin milionoj da vegetalaj kaj bestaj specioj. Se oni ankoraŭ ne bremsos la ekspluatado kaj utiligon de la naturaj riĉfontoj, do en la fino de la nuna jarcento, laŭ la aserto de la Internacia Naturprotekta Ligo, pereos pliaj kvindek mil ĝis miliono da specioj. Nun la arbaroj reduktiĝas pli kaj pli serioze. En la historio la totala areo de la arbaroj sur la tero superis 7 600 000 000 hektarojn, sed en la 19-a jc. ĝi reduktiĝis al 5 500 000 000 hektaroj, nun restas nur 2 800 000 000 hektaroj,

Ĝjiĝŭangzi-traktejo de Malpura Akvo en Tjanĝin, kiu estas la plej granda duaklaŝa tia traktejo en Ĉinio kaj ĉiutage traktas 260 000 tunojn da akvo



kaj krome ĝi ankoraŭ malgrandiĝas po 20 000 000 hektaroj ĉiujare. En 1982 la arbaro kovris nur 31.5% de la tero en la mondo. Laŭ ekologiaj tialoj, ke almenaŭ pli ol 30% de la tero en la mondo estas kovritaj de la arbaroj, povas efike malhelpi la superakvon, trosekecon, ventegon kaj sablon, kaj la nuna procentaĵo de la tero kovrita de arbaroj jam estas ĉe tiu kriza limo. La troa konsumado de dolĉakvo ankaŭ faris averton al la homaro. La tergloba havas pli ol kvar milionojn da kubaj km. da dolĉakvo. Laŭ la takso, ĉiujare 400 kubaj km. da dolĉakvo estas poluciitaj sur la terglobo. Krome kreskas ankaŭ la akva konsumado de industrio, agrikulturo kaj popola vivo, pro kio la provizado de dolĉakvo fariĝas pli kaj pli streĉa. Aperis strangaj fenomenoj, ke Usono importas dolĉakvon de Kanado, kaj FR Germanio de Svislando. Krom la regenerivaj riĉfontoj, ankaŭ la neregenerivaj riĉfontoj, kiaj ŝtonoleo, karbo, natura gaso kaj ercoj, elĉerpiĝos en la proksima estonteco, se la konsumado kreskos laŭ la nuna rapideco. Laŭ la prognozo de la raporto "Limo de Kresko" redaktita de usonaj fakuloj, petrolo baldaŭ elĉerpiĝos kaj ankaŭ ercoj estos elĉerpitaj post nelonge: La kromo je 80 jaroj, volframo je 31 jaroj, plumbo je 25 jaroj, arĝento je 19 jaroj. . .

La kialoj de ekscesa konsumado de la naturaj riĉfontoj estas alta disvolviĝo de produktaj fortoj, tro granda loĝantaro, diverseco de konsumaj postuloj kaj neracia utiligo de la riĉfontoj.

De 1952 ĝis 1975 la produkto kaj konsumo de ĉiuj landoj kreskis preskaŭ egale rapide. La totala nacia produktovalorado de Usono kaj ĝia energia konsumo 2.4-obliĝis kaj 2.1-obliĝis respektive, kaj tiuj de Britio 1.9-obliĝis



Laboras veturilo por aŭtomata kontrolo de atmosfera polucio.

kaj 1.3-obliĝis respektive. En la evoluintaj regionoj de Eŭropo kaj Ameriko, en la mezo de la 70-aj jaroj la konsumo farita de la loĝantoj konsistigis 35% de la tuta energia konsumo. En la disvolviĝantaj landoj kaj regionoj la rapida kresko de loĝantoj ofte kaŭzas ekscesan ekspluatadon kaj konsumadon de riĉfontoj.

KIOM DA HOMOJ LA TERGLOBO POVAS VIVTENI?

Konsidere la fakton, ke por la regenerivaj riĉfontoj estas malfacile repreni sian normalan staton kaj la rezervokvanto de neregenerivaj riĉfontoj ne estas granda, multaj ekologiaj timas, ke la ŝarĝpovo de la tero jam proksimiĝas al kriza limo.

Kiom da loĝantoj la tero povas vivteni? Tio estas demando malfacile respondebla sen konsidero pri la koncerna produktonivelo. Se la nivelo de konsumo de la homa vivo estas malalta, do la tero povas vivteni pli multajn homojn. Sed la homoj diferencas de aliaj animaloj per tio, ke ili strebas al altnivela vivo.

Tial oni devas solvi la problemon surbaze de altnivela konsumo. Nutrajologoj opinias, ke la nutraj elementoj (inkl. de sufiĉaj proteinoj, sukeroj kaj graso) de manĝaĵoj kun 9 000 grandaj kalorioj jam sufiĉas por la homa unutaga vivo. Tial ĉiu homo bezonas 1 000 kg. da greno jare. En la nuna mondo la kultiveblaj kampoj estas 1.4 miliardoj da hektaroj. Iuj taksas, ke la areo de la kampoj povos superi 3.4 miliardojn da hektaroj. Se tiel, la terglobo do povos vivteni 51 miliardojn da loĝantoj. Sed multaj fakuloj rigardas la takson tro optimisma, ĉar unue, la virgaj kampoj restas ne multaj, kaj grandskala ekspluatado eble detruos la ekologian ekvilibron; due, la kampoj reduktiĝas kun la industria disvolviĝo kaj dilatiĝo de la urbaj loĝantoj; kaj trie, la pohektara produktokvanto povos kreski ne pli ol duoble. Estas dezirinde, ke la kultiveblaj kampoj restu 1.4 miliardoj da hektaroj kaj la pohektara grena produktokvanto atingu 7.5 tunojn. Tial la tero povas vivteni maksimume ĉ. 10.5 miliardojn da lo-

ĝantoj. Laŭ la takso en la raporto de la Konferenco de Homa Medio de UN, la totala nombro de loĝantoj de la mondo stabile fiksiĝos sur la nivelo de 11 miliardoj kaj iom pli. La du supreme cititaj ciferoj estas preskaŭ samaj. Tiam la homaro povos vivi bone kaj la ekologia ekvilibro ne perdiĝos.

MEDIA POLUCIO KAJ HOMA SANO

En la nuna mondo la riĉfontoj estas ekscese ekspluatataj kaj la medio pli kaj pli malboniĝas, kio serioze minacas la homan sanon. La suferantoj de kancero multoble kreskis en la pasintaj dekoj da jaroj. Kaj tiuj de pulma kancero kreskis kelkdekoble. Medicinistoj opinias, ke tio havas striktan rilaton kun la aera polucio. En la 50-aj jaroj la atmosfero estis poluciita ĉefe de gaso ellasita de brulinta karbo. Sed en la 60-aj jaroj tiukampe la karbo cedis lokon al petrolo, en la 70-aj jaroj rapide kreskis la nombro de aŭtoj, kies ellasita gaso, prilumita de ultraviolaj radioj, fariĝis venena fumo. Oni nomas ĝin polucio de radio-kemia fumo. Nun la malsanoj de spiraj organoj estas kaŭzitaj ĉefe de la polucio de la atmosfero. Ĉiujare en Usono oni lasas en la aeron 200 milio-

nojn da tunoj da venenaj substancoj. Ĉiu homo enspiras dekkelkajn kg. da venenita aero po tage. Estas imageble, kiom grandan damaĝon tio alportas al la homoj. Laŭ la kalkulo de usonaj sciencistoj, se la polucio de la atmosfero en la grandaj urboj de Usono reduktiĝos je 50%, do la ftizuloj reduktiĝos je 25%, kormalsanuloj je 20-50% kaj la homa vivo longiĝos meznombro je 4-5 jaroj. La akva polucio estas alia granda origino de la media polucio. Granda kvanto da poluciita akvo ellasita en produktado kaj ĉiutaga vivo entenas venenajn elementojn, kiaj fenolo, ciano, kadmio, plumbokaj kromo, kiujn la akvo ne eliminis per si mem. Jam estas ne rara la fenomeno, ke poluciita akvo kaŭzas mortigajn malsanojn. Antaŭ kelkaj jaroj oni trovis acidan pluvon, alian fenomenon de la media polucio. Ĝi koncentre okazas en la nordorienta parto de la Norda Ameriko kaj sur la eŭropa ebenaĵo. Nun ĉiujare la mondo ellasas en la aeron 150 milionojn da tunoj da sulfodioksido, kiu en kombino kun akva vaporo en la aero, formas acidan pluvon, kiu falas teren kiel polvo, neĝflokaj kaj nebulo. La acida pluvo venenas fiŝojn kaj aliajn akvajn kreskaĵojn, detruas la arbarojn kaj da-

maĝas la homan sanon. Oni nomas ĝin malario en la biosfero. Nun ĉiujare 2 000 ĝis 4 000 homoj en FR Germanio, 1 500 ĝis 5 000 homoj en Britio kaj 15 000 ĝis 25 000 homoj en Usono fariĝas viktimoj de acida pluvo. La alia polucio de la medio estas polucio de la tero. La pezaj metaloj en la aero, akvo, kemiaĵoj kaj insekticidoj, kiaj hidrargo, arseno, kromo, kupro, zinko, plumbo kaj kadmio, sedimentas en la grundo kaj fine damaĝas homojn tra la bioĉeno de "grundo — plantoj — brutoj kaj kortobirdoj — homoj". Ankaŭ bruo estas grava origino de la media polucio kaj estas unu el la kaŭzoj de kormalsanoj por ne paroli pri la nuklea polucio al la homa vivo.

Hodiaŭ la evoluantaj landoj multe suferantaj de la media polucio jam komencis batali kontraŭ la media polucio kaj atingis unuapaŝan sukceson. En la rivero Tamizo, kiu estis preskaŭ morta rivero en la 50-aj jaroj, nun estas vidataj fiŝoj. Kaj Rejno, la antaŭa "kloako de Eŭropo", nun repuriĝas. Ankaŭ multaj disvolviĝantaj landoj komencis produktante ordigi la medion. La homoj jam bone komprenas, ke ili kaj iliaj posteuloj devas alpreni kune paŝojn por protekti la teron, grandan ruliĝon de la homaro.



Fragmentoj el amleteroj

Mi rakontas amaferon ne de ordinaraj gejunuloj, sed de universitata diplomito kaj senbraka junulino.

Iun tagon junulo Hu Ĝjanĉing el kamparana familio en montaro, lernanta en la Ŝandong-a Normala Universitato, legis raportaĵon "Senbraka Junulino" en iu gazeto. La raportaĵo informis


pri Ĝaŭ Ĉangŭen, senbraka junulino de la Lanĝoŭ-a Fervoja Buroo en Gansu-provinco, kiu diligente laboris kaj venkis sur la vojo de sia vivo malfacilojn ne-imageblajn por ordinaraj homoj. La raportaĵo malkvietigis lin.

"Kiel junulino sen brakoj vivas kaj kontribuas al la socio?" Pro scivolemo li skribis leteron al la

Lanĝoŭ-a Fervoja Buroo. La respondo konfirmis la raportaĵon. Tiam li havis pezan taskon de lernado. Foje li ne akiris bonan noton en ekzameno de la angla lingvo kaj ekpensis pri Ĝaŭ Ĉangŭen: Ŝi ne vizitis lernejon eĉ unu tagon, sed memlernis ĉiujn kursojn de elementa kaj supera mezlernejoj. Kio stimulas

Gaŭ Ĉangŭen kaj ŝia edzo





ŝin? Post pripensado li skribis al la junulino loĝanta 1 000 kilometrojn for de li.

“Nur tiu, kiu faras grandan penadon, kian aliaj ne faris, povas rikolti kion aliaj ne povas. . .” La vortoj en ŝia letero multe edifis lin. Li pensis en si: Ŝi, kripla junulino, estas tiel strebema en sia kariero, ĉu mi, sana junulo, ne povas gajni bonajn notojn en lernado? De tiam li diligente lernis kaj dimanĉe kaj festotage. Post unu semestro li multe progresis en la lernado de la angla lingvo.

Poste li ofte skribis al Ĝaŭ pri lernado, idealo kaj estonteco.

La konstanta korespondo proksimigis la du korojn. Kiam li studis en la tria klaso, li skribis al la junulino por demandi, ĉu ŝi estonte edziniĝos.

En sia respondo Ĝaŭ diris: “Mi, grave kripligita, ne konsideras amon kaj vivos sola. Mi ne volas, ke aliulo dividu kun mi la doloron.”

La bonkoreco kaj firmeco de Ĝaŭ vekis amon de Hu. Li verŝis sian koron al ŝi: “Se vi per-

mesas, mi estu viaj brakoj kaj ni kunvivu ĝis la fino de la vivo.”

Sendinte la leteron, Hu dronis en malkvieto. Li malpacience atendis respondon. Fine li ricevis ŝian leteron kun rifuzo. En la letero ŝi diris: “Mi dankas vin pro via bona intenco, sed fakte tio estas neebla. Vi kaj mi startis de malsama nivelo kaj ne povos kune ĝisiri la finon de la vivo.”

Leginte la leteron, Hu iom kvietiĝis. Li diris: “Mia koro estis konkerita ĝuste de tio, ke ŝi ne donas facilan promeson, nek petas alies kompaton.”

Poste li skribis plurajn leterojn al ŝi, ke ŝi detale rakontu sian travivaĵon. Ŝi akurate respondis. En letero ŝi skribis:

“Ĝjanĉing, mi devenas el fervojista familio. Kiam mi estis unujara, iun tagon mia patrino demetis min por estingi la fajron sur fervojaj ŝpaloj. Mi rampis por serĉi la patrinon kaj malfeliĉe miaj brakoj estis derompitaj de trajno moviĝanta el la fajro.

“Komence mi ne konsciis la seriozan sekvon de perdo de la brakoj, sed sentis solecon. Kiam la gepatroj iris al laboro kaj la frato al lernejo, mi sola restis hejme, kvazaŭ cerveto fermita en stalo.

“Foje mi kolerigis mian kate-ton kaj ĝi rapide saltis sur fenestrobreton kaj faligis sur la plankon poton da verdaj fazeoloj. Mi ĉagreniĝis, dum la kateto senzorge prenis pilkon per ambaŭ siaj piedoj. Vidinte tion, mi pensis: ĉu mi ne povas kolekti la fazeolojn per mia piedo? Mi sidiĝis sur tabureto kaj provis kolekti per dekstraj piedfingroj. Komence verdaj fazeoloj ruliĝis ĉien, kaj mi ne povis kapti eĉ unu. Poste mi streĉis la tutan forton kaj atente levis la fazeolojn unu post



Gaŭ Ĉangŭen trikas.

alia. Mi ne sciis, kiom da tempo pasis. La ŝvito malsekigis miajn vestojn. Tamen mi sukcesis! Mi tre ĝojis kaj ekkantis.

“De tiam fasko da sunlumo ekbriligis mian monotonan vivon. Mi povas fari ankaŭ aliajn aferojn per la piedoj kaj tiel kreas mian novan vivon.

“Jam en la aĝo de 7-8 jaroj mi ellernis nemalmulte da vortoj, kiujn mia frato instruis al mi, kaj poste mi ellernis skribadon per piedfingroj. Tiel mi iom post iom ellernis la kursojn de miaj samaĝuloj. Sed ĝuste tiam miaj gepatroj mortis unu post alia. Pro tio malaperis sur mia vizaĝo la ĝojo donita de miaj gepatroj. Mi sentis nur ian forton ekscititan de la doloro.

“En la aĝo de 17 jaroj mi ellernis milojn da vortoj. Mi legis librojn kaj ĵurnalojn, skribis leterojn, verkis artikolojn, instruis

infanojn kanti kaj pentri. Miaj artikoloj estis aperigitaj en ĵurnaloj kaj gazetoj. Miaj kaligrafiaĵoj faritaj per piedo estis multfoje montrataj en kultura domo kaj laŭdataj de vizitantoj.

“En 1978 la Langŭoŭ-a Fervoja Buroo havigis al mi laboron en la virina banejo de iu fabriko. La valvoj de akvaj kaj vaporaj tuboj en la banejo estis alte instalitaj. Fermi kaj malfermi ilin estis malfacile por mi. Pro malatento mi povus glitfali en basenon. Por posedi la kapablon, mi senĉese ekzercis min. Fine mi povis lerte fermi kaj malfermi grandajn kaj malgrandajn valvojn. Krome, mi ankaŭ ŝvabris la plankon, purigis la basenon, lavis tukojn kaj helpis maljunulinojn. Mi estis ofte laŭdata.”

Kun larmoj Hu finlegis la leteron. Li pensis: “Kiun alian mi povas ami krom ŝi!” Li plurfoje skribis al Ĝaŭ kaj fine konkeris

ŝian koron. Post nelonge li vizitis la junulinon en ferioj. Ili ĝefianĉiĝis kaj decidis, ke fininte la universitatan studon, Hu laboros en la urbo Langŭoŭ de Gansu-provinco.

Sed kiam Hu skribis al siaj gepatroj pri tio, la patro malaprobis ilian decidon.

Hu dronis en ĉagreno. Li devis konvinki la gepatrojn. Li skribis al ili longan leteron kun espero, ke ili komprenos kaj subtenos ilian aferon.

En la longa letero de la filo la patro trovis, ke la filo jam maturiĝis kaj havas profundan konon pri la vivo. La patro tuj skribis al la filo: “Via elekto en kariero kaj amo estas ĝusta, sed vi devas kompreni la koron de la gepatroj. Vi jam faris decidon kaj nia tuta familio subtenas vin. Sed nepre memoru: Kiel ajn malfacila estos la vojo de la vivo, ne ŝanceliĝu nek retiriĝu. Kaj tiel persistu ankaŭ en servo al la popolo. Jen virto de nia nacio kaj ankaŭ de nia familio. Nepre memoru tion.”

La letero emociis la gejunulojn ĝis larmoj.

Fininte ĝa lernadon en julio de la pasinta jaro Hu ĝoje venis instrui en iu mezlernejo de Tjanŝuj de Gansu-provinco en la nordokcidenta parto de Ĉinio. En la mezo de aŭgusto ili okazigis sian geedziĝan ceremonion.

Hu diris al mi: “La vivo de homo estas mallonga, dum lia kariero eterna. Sur la vojo de la vivo ni eble renkontos multajn malfeliĉojn kaj malfacilojn neatenditajn. Sed mi kredas, ke en la komuna afero mi kaj Ĝaŭ daŭre antaŭeniros ŝultro ĉe ŝultro.

*Tiu ĉi artikolo estas en *facila lingvo*.

Esperantaj Libroj

Literaturaj verkoj:

Kanto de Juneco (romano)	312pĝ.	£1,90	US\$3,90	10-Es-605P
Noveloj de Lusin (noveloj)	532pĝ.	£2,80	US\$4,80	10-Es-1290S
Aŭtuno en la Printempo (novelo)	116pĝ.	£2,90	US\$5,90	10-Es-1525
El Ĉina Poezio (poemoj)	166pĝ.	£2,90	US\$5,90	10-Es-1526
Ŭang Guj kaj Li Ŝjangŝjang (eposo)	58pĝ.	£1,55	US\$2,85	10-Es-71S
Montara Vilaĝo (romano)	272pĝ.	£3,85	US\$7,80	10-Es-1882S
Bronza Tigro (dramo)	138pĝ.	£2,90	US\$5,90	10-Es-1954S
Verkoj de Verda Majo	510pĝ.	£4,20	US\$8,50	10-Es-1653S
Bukedo al Vi (mikronoveloj)	96pĝ.	£0,65	US\$1,30	10-Es-1881P

Popolaj rakontoj:

Rakontoj pri Afanti	78pĝ.	£0,65	US\$1,30	10-Es-1578PA
Saĝo-sako	78pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1778P
La Feliĉa Birdo	56pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1866P
Papilia Fonto	68pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1883P
Magia Ŝipo	76pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1623PA

Feniksa libraro:

40 Vidindaj Lokoj en Ĉinio	272pĝ.	£1,90	US\$3,90	12-Es-1825P
Dek Ses Urboj de Ĉinio	176pĝ.	£1,90	US\$3,90	17-Es-1885P
Mia Vivo	128pĝ.	£0,80	US\$1,70	17-Es-1884P
Pitoreska Pekino	74pĝ.	£0,95	US\$2,00	17-Es-1827P
Albumo pri Ĉinio	98pĝ.	£1,90	US\$3,90	85-Es-175P

Infanlibroj:

Kolorigu	120pĝ.	£2,90	US\$5,90	88-Es-205P
Bonkora Ŝjaudon	60pĝ.	£1,10	US\$2,30	88-Es-204P
Brava Kolombido	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-244P
Petolema Kaprido	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-241P
Lutro kaj Bufo	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-242P
Kokido Venĝis Sian Panjon	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-246P
Du Katetoj	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-243P
Senmortigaj Fruktoj	68pĝ.	£0,50	US\$0,95	88-Es-194P
Plaŭ! Plaŭ!	60pĝ.	£1,10	US\$2,30	88-Es-201P
En la Bestoĝardeno	80pĝ.	£1,30	US\$2,60	88-Es-174P
Magia Peniko	40pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-178P
Anaseto kaj Koketo	28pĝ.	£0,35	US\$0,70	88-Es-176P
Ora Hakilo	32pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-195P
Kiel Kovi	28pĝ.	£0,50	US\$0,95	88-Es-196P
Malatentema Virino	24pĝ.	£0,50	US\$0,95	88-Es-197P
Vostkonkurso	16pĝ.	£0,30	US\$0,65	88-Es-200P
Konstrui Novan Ponton	40pĝ.	£0,22	US\$0,40	88-Es-156P
La Fiera Multkolora Kateto	44pĝ.	£0,95	US\$2,00	88-Es-154P
Mapo de la Ĉina Popola Respubliko		£0,50	US\$0,95	12-Es-176P

Mendu ĉe: **Libroservo de UEA**

Perantoj de EPC

aŭ **Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHU-
DIAN)**, Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Opinioj Alte Taksindaj

— Dankon, karaj legantoj

Dum la lastaj jaroj ekde 1982 nia redakcio regule faris enketon inter niaj legantoj, ke ili elektu en EPĈ la elstarajn artikolojn, bild-paĝojn kaj kovrilojn de la antaŭa jaro. Ja estas ĝojo por ni konstati, ke kun ĉiu jaro pli kaj pli da legantoj respondis konforme al nia peto. Por la jaro 1985 entute 670 legantoj en 37 landoj resendis al ni plenigitajn enketilojn. Tio konsistigis la plej grandan nombron de la respondoj ĝis nun ricevataj. Rimarkindan impreson donis la fakto, ke inter tiuj resendintoj-legantoj troviĝis dek, kiuj aĝas pli ol 80 jarojn, kaj ses, kiuj estas en la aĝo de 10 ĝis 15 jaroj. Sekve tio estas agado, en kiu renkontiĝis niaj maljunaj legantoj kun niaj junaj.

La sperto dum tiuj ĉi pasintaj jaroj ankaŭ evidentigis, ke la enketo estas vere grava por EPĈ kaj, krome, signifplena. Ĝi ne nur montris al niaj redaktoroj, kiuj artikoloj, bildpaĝoj aŭ kovriloj plaĉis al niaj legantoj, sed ankaŭ sciigis nin, pri kiuj temoj ni devas fari raportadon, por ke la enhavo de EPĈ estu pli interesa kaj pli plaĉa al niaj legantoj. En la resenditaj enketiloj por 1985 la legantoj proponis 168 temojn, kaj tiamaniere ili

donis al ni rezervon da temoj pritraktotaj. Kvankam ne ĉiu el tiuj temoj estos efektivebla, tamen ni certe faros nian eblon por realigi ilian esperon.

Kiel la enketiloj por 1985 montris, junuloj, mez-aĝuloj kaj maljunuloj konsistigis respektive trionon de la resendintoj-legantoj. Ĉirkaŭ 53 procentoj el ili estas studentoj kaj profesiuloj en la kampoj de edukado, scienco, tekniko, literaturo kaj arto kaj tiuj kiuj okupiĝas pri ĵurnalismo kaj medicino. Proksimume 27 procentoj estas emeritoj kaj dommastrinoj. El la totala nombro de la resendintoj kvarono estas niaj legantinoj. Kompare al nia statistiko antaŭ kvin jaroj la ŝanĝo estas konsiderinde granda. La nunaj ciferoj kompreneble ne povas reprezenti la aktualan, kompletan fizionomion de nia legantaro, sed ili certgrade servas kiel taŭga orientilo por nia laboro.

El la respondoj en la enketiloj por 1985 al la demando, kiam la resendinto komencis aboni EPĈ, oni konstatis, ke la nombro de novaj legantoj multege kreskis kaj ili konsistigis 45 procentojn de la totala nombro. Ĉar ili eklegis nian revuon nur antaŭ unu aŭ du jaroj, ili

ne sciis, kiuj artikoloj jam foje aperis en EPĈ, kaj konsekvence ili proponis en siaj enketiloj la temojn pri la antikva aŭ moderna historio de Ĉinio, pri la ĉinaj tradiciaj fest-tagoj, pri la familiaj kaj personaj nomoj de ĉinoj, ktp, tamen pri tiuj temoj, kiel ĵus dirite, oni jam antaŭ longe faris raportadon en nia revuo. Malgraŭ ĉio tio prezentis al ni la demandon kiel ni povas kontentige prizorgi la postulojn de kaj la novaj kaj la malnovaj legantoj.

Ĝenerale parolante, ni multe profitis de ĉiu enketado farita dum la lastaj jaroj, ĉar niaj legantoj per siaj respondoj donis grandan kvanton da proponoj, sugestoj kaj kritikoj. Ĉiuj alportis helpon al nia klopodo por la plibonigo kaj pliriĉigo de EPĈ. En ĉiuj revenintaj enketiloj ni ĝoje konstatis la amikecon, sincerecon kaj malkaŝemon de niaj karaj legantoj. Ili multe kuraĝigis kaj instigis nin daŭre antaŭeniri en la intereso de nia revuo EPĈ. Kun espero ni anticipas la pluan kunlaboron de ĉiuj niaj legantoj.

Ĉi-sube ni listigis la titolojn de tiuj artikoloj kaj bildpaĝoj kaj kovriloj, kiuj laŭ la statistika ordo por 1985 montriĝis elstaraj.

Artikoloj: Antikva urbo Pekino (n-ro 1), Pagodoj de Ĉinio (n-ro 7), La religia kredo de tibetanoj (n-ro 9), Fosilia simio antaŭ 200 000 jaroj (n-ro 6), Konstrui socialismon kun ĉinaj trajtoj (n-ro 3), Kiel Ĉinio traktas junajn krimulojn? (n-ro 8).

Bild-paĝoj: Pagodoj de Ĉinio (n-ro 7), Ĝardena urbo Suĝoŭ (n-ro 9), Antikva urbo Pekino (n-ro 1), Ĉangŝa — granda urbo en centra Ĉinio (n-ro 5). Ĉiuj supraj estas bild-paĝoj akompanantaj la artikolojn kun samaj titoloj.

Kovriloj: Sur revenvojo (n-ro 10), Potala-palaco en malproksimo (n-ro 1), Patrino kaj filo (n-ro 6).

La rubrikoj plej ŝatataj laŭ statistika ordo estas: Vojaĝo tra Ĉinio, Enciklopedieto de Ĉinio, Tibeto hieraŭ kaj hodiaŭ kaj Por via sano.


KORESPONDI DEZIRAS

- * La Esperanto Centro Torino metas je la dispono de ĉiuj interesotaj instruistoj la didaktikan materialon kaj la akiritan sperton, kaj petas kunlaboron de aliaj instruistoj kiuj jam sin dediĉas al similaj iniciatoj. La celo estas starigi seriozan kaj daŭran korespondadon gvidotan de la instruistoj kun klaso de 8-9-jaraĝuloj. Skribu al: Scuola Elementare G. Allievo, IIIa -A Sig. Dematheis, Via Vibo, 62, 10100 Torino, Italio.
- * Juho Vattulainen, 81150 Riihikangas Roivas L.T., Suomi, volas korespondi tutmonde pri diversaj temoj.
- * Bildlibrojn por infanoj konstante interŝanĝas Esperanto-Rondo en Ikeda, Kawamura-kata, Muromati 5-13, Ikeda-si, 563 Japanio. Skribu al ni. Rekompenco per

libroj aŭ aliaj interesajoj. Ni celas kolekti 100 librojn jubilee al Esperanto-100-jariĝo. Respondo garantiata.

- * 21-j. fraŭlo dez. kor. kun Aziaj personoj, precipe pri vivmodo, amikeco, bildkarto kaj naturo. Adreso: Paulo L. Gottschalk, Rego Barros No. 510, 03460 Sao Paulo/SP-Brazilo.
- * Ni korespondos pri ĉiuj temoj, s-ro Reza (21j), f-ino Minoo (18j) tashakori, Box 11365-5715, Teheran, Irano.
- * **Ekspozicio en Florurbo** Esperanto-Klubo de Quedlinburg aranĝos internacian ekspozicion okaze de tradicia Florfestoj en aŭgusto 1986. Por montri la disvastigon de Esperanto ni atendas bele afrankitajn bildkartojn el tutmondo. Respondkartoj garantiataj. Bonvolu tuj skribi al s-ano Klaus Klimt, Gertenstr. 16, DDR-4300 Quedlinburg.

Lokoj Menciitaj en Ĉi Tiu Numero



1. Pekino
2. Ŝanhajo
3. Jingkoŭ
4. Ĉengde
5. Hajnan-insulo
6. Tibeta Aŭtonoma Regiono
7. Ĝjangŝi-provinco
8. Tjanŝu
9. Ŭejfang
10. Fuŝun

第二十六课 Dudeksesa Leciono

告 别

Adiaŭo

Ofte uzataj vortoj

祝贺你取得成功

中国给我留下深刻印象

希望你再来

祝你一路平安

zhùhè nǐ qǔdé chénggōng

Zhōngguó gěi wǒ liúxià

shēnkè yìnyàng

xīwàng nǐ zài lái

zhù nǐ yìlù píng'ān

gratulon pro via sukceso

Ĉinio impresas min profunde

(mi) esperas, ke vi venos denove

bonan vojaĝon al vi

Dialogo

A: 鲍尔先生, 祝贺你的中国之行取得成功!

A: **Bào'ěr xiānsheng, zhùhè nǐde Zhōngguó zhī xíng qǔdé chénggōng!**

Paŭlo sinjor-, gratul- via Ĉini- vojaĝ-
akir- sukces-

A: Gratulon pro via sukceso en la vojaĝo tra Ĉinio, sinjoro Paŭlo!

B: 谢谢。这次访问中国给我留下了深刻的印象。

B: **Xièxie. Zhècì fǎngwèn Zhōngguó gěi wǒ liúxià le shēnkè de yìnyàng.**

dank-. ĉi-foj- vizit- Ĉini- don- mi las-
profund- impres-

B: Dankon. La ĉi-foja vizito al Ĉinio impresis min profunde.

A: 希望你能有机会再来中国。

A: **Xīwàng nǐ néng yǒu jīhuì zài lái Zhōngguó.**
esper- vi pov- hav- okaz- ven- denov-
al Ĉini-

A: Mi esperas, ke vi havos okazon veni denove al Ĉinio.

B: 我们一定会再见面的。

B: **Wǒmen yīdìng huì zài jiànmiàn de.**
ni cert- pov- denov- renkontiĝ-

B: Ni certe renkontiĝos denove.

A: 祝你一路平安!

A: **Zhù nǐ yìlù píng'ān!**

dezir- vi tut- voj- sekur-

A: Bonan vojaĝon al vi!

B: 谢谢。再见!

B: **Xièxie. Zàijiàn!**

dank- denov- vid-

B: Dankon. Ĝis revido!

A: 再见!

A: **Zàijiàn!**

denov- vid-

A: Ĝis revido!

Klarigoj:

1. 中国给我留下了深刻印象: Verbo + 下 esprimas la finon de ago kaj kelkfoje ankaŭ la rezulton de ago.

2. 祝你一路平安 estas uzata ĉe adiaŭo. 祝 esprimas bonan deziron. 我 (la unua persono) estas forlasebla. 一路平安 signifas pacon kaj sekuron dum vojaĝo.

TESTO DE INTELIGENTECO

Matene de somero, iu junulo promenis ĉe rivereto kaj vidis belan knabinon, kantantan ĉe la fluanta akvo. Ŝia kanto spiris senliman malĝojon. La junulo demandis, kian ĉagrenon ŝi havas kaj ĉu ŝi bezonas lian helpon. La knabino respondis, ke ŝi estas sklavino turmentata de demonoj. Se la junulo volas savi ŝin, nur unu rimedo povas esti aplikata: Li vidos en proksima loko kvin tute samajn rododendrajn florojn, el kiuj kvar estas transfor-

miĝintoj el demonoj kaj la knabino baldaŭ fariĝos la kvina. Se la junulo unufoje plukos la floron transformitan el ŝi, liberiĝos do la knabino. Se ne, ankaŭ la junulo mem sklaviĝos de la demonoj. La junulo promesis tion fari senhezite. La knabino do ŝanĝiĝis en fumstrion kaj tuj malaperis.

La junulo trovis la kvin rododendrajn florojn kvin paŝojn for de si. Li pririgardis ilin en matena lumo kaj plukis unu el ili. Jen ĝi fariĝis la bela knabino.

Kiel la junulo trafe plukis la deziratan floron?

(Solvo trovebla en ĉi numero)

KIU STARAS PLI STABILE?

— Fizikkulturaj ludoj

Preparo: Streku grandan cirkon surtere. La ludantoj ĉirkaŭstaru tuj ekster ĝi kaj ambaŭmane tenu ŝnuron cirkon same grandan, kiel la strekita cirklo.

Maniero: Aŭdinte la ordonon de la organizanto pri ekludo, la ludantoj devas tuj tiri la ŝnuron


cirkon por tiri najbarajn ludantojn internen de la cirklo. Kiu estas tirita internen de la cirklo, devas forlasi la ludon. La ludo daŭras, ĝis kiam oni ne povos plu tiri, kaj la restaj ludantoj estas venkantoj.

Atentu, ke la ludantoj ne devas malstreĉi la manojn kaj la malobservantoj devas retiriĝi el la ludo. Ankaŭ estas malpermesite puŝi la apudstarantojn.

LUKTO PRO PILKO

Preparo: Streku surtere cirkon kun diametro de du metroj. Du ludantoj staru interne de la cirklo kaj brakumu unu pilkon (korbo-, flug- aŭ piedpilko) kun interkrucitaj brakoj.

Maniero: Aŭdinte la ordonon pri ekludo, la du ludantoj povas lukti pro la pilko plenforte, sed ne devas piedpremi la cirklan linion nek eliri el la cirklo. Kiu deprenas la pilkon, tiu estas venkanto. En la ludo manlevo, falo aŭ elcirkliĝo signifas malsukceson. La ludantoj ne devas piede faligi unu la alian nek perkorpe elpuŝi la rivalon el la cirklo.



Ora ĉiela globuso

de **JUAN HONGCJI**

La ora ĉiela globuso kun alteco de 83 cm. kaj diametro de 29 cm. estis farita en la regperiodo de la imperiestro Ĉjanlong (1736-1796 sur trono) de Ĉing-dinastio (1644-1911).

La globuso surhavas 300 konstelaciojn markitajn per 3 240 grandaj kaj malgrandaj perloj kaj oni povas klare vidi sur ĝi la sunon, lunon kaj stelojn. Ĉirkaŭ la globuso estas tempodifinilo, la suda kaj norda polusoj, meridiano, horizonto, ekliptiko, ekvatoro, kompasoj k.a.

La globuso, subtenata de naŭ oraj drakoj, havas rondan filigranitan bazon kun emajlaj

leonkapoj. Ĝi estas bonkvalita, bela kaj stabila. Drako kaj leono estas rigardataj kiel tradiciaj feliĉigaj kaj riĉigaj bestoj de Ĉinio. Laŭ historiaj notoj, la globuso estas modelo farita laŭ la movado de la ĉiela korpo en iu tago en la regperiodo de la imperiestro Ĉjanlong. Ĝi estis nur distraĵo de la imperiestro kaj ne havas praktikan valoron.

Nun ĝi estas eksponata en la Imperiestra Palaco de Pekino.



Ora čīela globuso

01174

